

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:	Pago por anoncoj:
kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 =	15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
frankoj 4,25 = rubloj 1,50.	8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

Uppsala.

Junio—Julio 1896.

N:o 6—7.

De la redakcio.

Pro kelkaj kaŭzoj la maja numero de nia gazeto eliris tre malfrue. Por eviti la malfruigon de la sekvantaj numeroj, ni decidis kunigi la junian kaj la julian numerojn en unu kajeron. La sekvantaj numeroj estos dissendataj regule ĉirkaŭ la 15-a de ĉiu monato.

En la antaŭa numero ni presis la leteron de s-ro Ŝatunovski pri la pligrandigo de nia gazeto. Ni pensas ke la maniero pligrandigi la gazeton, montrita en tiu ĉi letero, meritas atenton de niaj amikoj, kaj ke inter ili troviĝos ankaŭ aliaj personoj, kiuj deziras sekvi la ekzemplon de s-ro Ŝatunovski.

Ĉar unu el la redaktoroj de "Lingvo Internacia", s-ro V. Langlet, nun forestas el Uppsala, ni petas ĉiujn leterojn kaj artikolojn, koncernantajn la redakcion, direktadi de nun ĝis la sekvanta anonco, al s-ro V. Gernet en Odeso. La adreso de s-ro Gernet estas: Rusujo, Odeso, Staroportofrankovskaja, 80.

La redakcio.



Memstareco.

Kelkaj amikoj min demandas, kial mi nenion skribas en nia nuna gazeto "Lingvo Internacia", kelkaj eĉ konkludis el tiu ĉi fakto, ke mi eble havas ian nekontentecon kontraŭ la nova gazeto. Mi rapidas raporti al la demandantoj, ke tiu ĉi konkludo estas tute erara.

Nia nuna gazeto ne aperas kiel io nova, partia, kiel kelkaj en la komenco pensis; ĝi estas — kvankam sub alia redakcio — pura daŭrigo de la gazeto antaŭa; ĝi prezentas nian komunan, tre bone redaktatan centran organon, kaj mi varmege rekomendas ĝin kiel unuan kaj plej necesan objekton por niaj amikoj. Ĉion alian niaj amikoj povas fari aŭ ne fari; sed kiu ne abonas nian standardon, la "Lingvon Internacian", tiu ne estas esperantisto.

De la tago de naskiĝo de nia afero ĝis decembro 1895 la kondukado de nia afero trovis sin ĉiam en la manoj de ĝia iniciatoro. Tio ĉi estis ne bona, ĉar vole-ne-vole tio ĉi donadis al la afero karakteron iom personan. Sed bedaŭrinde alie ne povis esti, ĉar ekzistis ankoraŭ neniuj, kiu volus kaj povus preni sur sin la kondukadon de la afero. Sed la nuna gazeto, kiu estas bonege redaktata, en kiu mi eĉ unu vorton ne trarigardas antaŭ la presado kaj de kiu aperas jam la sepa numero, montras tre konvinke, ke nun nia afero estas jam tute memstara kaj ne bezonas pli ne sole mian kondukadon, sed eĉ mian helpadon. Tio ĉi estas tre grava cirkonstanco, kaj, kiel tute ĝuste rimarkis s-ro Ben-David en la n-ro 2, tio ĉi faras *epokon* en nia afero. Ĝis nun oni povis ankoraŭ timi, ke nia afero vivos nur tiel longe, kiel vivos ĝia iniciatoro; nun, kiam la afero jam ses monatojn iras tre bone tute sen mia enmiksiĝado, la supre esprimita timo tute malaperas kaj nia afero metis jam sian piedon en la eternecon.

Estas tre dezirinde, ke la senpersoneco kaj memstareco de nia afero ĉiam pli kaj pli fortiĝu; tial mi nun penas detenadi min de ĉia gvidanta partoprenado en nia organo. Mi okupas min nur je konstanta registrado kaj adresokolektado de ĉiuj esperantistoj (kio devas fariĝadi ĉiam sensange en *unu loko*) kaj je eldonado de la "Biblioteko" de la lingvo Esperanto.

Venis jam la tempo ellabori detalajn *teĥnikajn* vortarojn de nia lingvo por ĉiuj sciencoj, profesioj, sportoj k. t. p. Tiujn ĉi vortarojn devas ellabori nepre *specialistoj*, ĉiu en sia specialeco. Por ĉiuj, kiuj posedas ian specialecon kaj konas ankaŭ bone nian lingvon, tiu ĉi laboro estos tute ne malfacila; ili agas erare, se ili atendas tiajn vortarojn de *mi*. Se mi, kuracisto, volus verki detalan teĥnikan vortaron ekzemple por inĝenieroj aŭ por brandfaristoj k. t. p., mi kreus nur sensencaĵon, dum *ili*, ĉiu en sia specialeco, kreos tre bonajn detalajn vortarojn, eĉ se ili nian lingvon posedas ne tute perfekte. Tiel same en ĉiu alia lingvo la popolo kaj la aŭtoritataj verkistoj ellaboris nur la *komunan* lingvon; sed la *specialajn* teĥnikajn vortojn ellaboras nur tiuj specialistoj, kiuj ilin bezonas, kaj en tiu ĉi okazo ia eĉ la plej malklera profesisto kreas sian bezonatan vorton bone, dum la plej aŭtoritata beletristo aŭ filologo kreus ĝin sensece.

Ĉe la kreado de detalaj teĥnikaj vortaroj la specialistoj devas sin gvidi je tiuj samaj reguloj, laŭ kiuj oni kreas ilin en *ĉiuj* lingvoj, t. e.:

1) Antaŭ ĉio oni demandas sin, ĉu tia vorto ne *ekzistas* jam en la komuna lingvo; ekzemple, se velocipedisto bezonas la vorton "rado", li kompreneble ne kreos novan vorton, sed prenos la vorton ekzistantan jam en la komuna vortaro.

2) Se oni scias, ke la bezonata vorto ankoraŭ ne ekzistas, t. e. simple ne estis ankoraŭ uzata, oni penas krei la vorton el la aliaj radikaj vortoj, kiuj jam ekzistas en la lingvo. Ekzemple, se en ia juna lingvo la unuan fojon devas aperi matematika verko, la verkanto, bezonante esprimi ekzemple "multobligho", "dividato" aŭ "triangulo", kreos tiujn vortojn facile el la vortoj jam ekzistantaj en la vortaro.

3) Se, fine, la vorto ne ekzistas en la komuna vortaro kaj krei ĝin el la ekzistantaj vortoj estas malfacile aŭ donas esprimon nekularan, tro longan kaj ne oportunan, la specialisto, ne longe pensante kaj ne ĝenante sin, simple prenas la vorton el ia alia lingvo, donante al ĝi nur la ortografion de lia lingvo. La elekto ordinare ne estas malfacila, ĉar la plej granda parto da vortoj de tiu ĉi 3-a kategorio estas egale uzataj (kiel vortoj "fremdaj") en

ĉiuj lingvoj kaj estas sekve jam per si mem *internaciaj*. Se vi dubas, ĉu la bezonata vorto estas uzata en ĉiuj lingvoj egale aŭ malegale, vi povas simple preni la vorton el la vortaro *franca* (kiun ĉiu povas ja facile havi), aŭ helpi al vi en ia alia maniero, tiel same, kiel en ĉiu juna lingvo helpas al si la kreantoj de novaj specialaj vortoj ne turnante ja sin al ia beletristo aŭ filologo.

Kiel tre bonan ekzemplon de tiu teĥnika speciala vortareto mi povas rekomendi la vortareton por filatelistoj, ellaboritan de s-ro René Lemaire tute sen ia helpo de mia flanko. Ĉio tie estas ĝusta, klara, oportune uzebla kaj severe en la spirito de nia lingvo. Se ne ĉiu el vi havas talenton krei tute bonan vortareton de sia specialeco, tio ĉi ne malhelpas kaj ne devas vin deteni: aliaj specialistoj de via specialeco legos poste vian vortareton kaj helpos al vi korekti kaj glatigi ĝin.

Kion ajn vi devos fari, prezentu al vi de nun ĉiam, ke la iniciatoro de la lingvo jam ne ekzistas, ke ekzistas nur la lingvo mem kaj ĝia popolo (la esperantistoj). La nuna vortaro de nia lingvo estas multege pli riĉa ol la vortaro de ĉia juna, ankoraŭ ne sufiĉe potenca popolo; sekve se en *tiuj* lingvoj la rapida riĉigado de la lingvo per fortoj komunaj iras tre facile kaj rapide, des pli facile ĝi iros en nia lingvo.

L. Zamenhof.



El Francujo.

Mi rememorigas la legantojn pri la enhavo de mia lasta artikolo "Esperanto kaj filatelo." Ankoraŭ unu vorton pri tio ĉi: mi pensas ke estus agrable por la esperantistoj filatelistoj konatiĝi inter si; tial mi aldonos al la eldonata libreto, post la modeloj de leteroj, malgrandan adresaron de la mendintoj; kun la adreso mi enmetos la sciigojn, kiujn ili donos al mi pri ilia kolekto (speco, nombro, k. t. p.). Per tio la kolektantoj povos koni la dezirojn unu de la alia, juĝi kun kiu ili povas fari interŝanĝojn; kaj tiamaniere kreigos certe tre agrablaj rilatoj inter tiuj el niaj amikoj, kiuj profitos tiun bonegan okazon de senpaga anoncado. Mi petas do ke ĉiuj, kiuj mendos al mi la filatelan verketon ne manku doni samtempe la necesajn sciigojn por la enskribo de iliaj nomoj en la dirita adresaro. Saman peton mi adresas al tiuj, kiuj jam skribis al mi.

René Lemaire,

place Carnot, n:o 7. *Epernay*
(Marne). *France.*



La vojo.

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek moko de l' homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, —
Ni semas kaj semas konstante.
“Ho, ĉesu!” mokante la homoj admonas, —
“Ne ĉesu, ne ĉesu!” en kor' al ni sonas:
“Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos.”

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco, —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

L. Zamenhof.

—❖—

Novaĵoj.

Oferado kaj propagandado.

S-ro *F. D. Avilov* skribas al ni:

“Konforme al mia propono kaj al la propono de s-ro *M. S. Rakitski*, mi promesas per tiu ĉi letero sendi ne pli malfrue, ol la 15-an de decembro de ĉi-tiu jaro, unu-tempe kun la abonpago de la gazeto por la estonta jaro 1897, al s-ro *Gernet* 1 % el mia jara salajro (proksimume 20 rubl.), forlasante la uzon de la mono al la bontrovo de nia plej estimegata estro (se oni tamen volas konformiĝi laŭ eblo kun mia deziro, mi deziras efektivigon de la propono de s-ro *Kazi-Girej*, nro 4, p. 56). — *F. Avilov.*”

S-ro *Gernet* aliĝas al la propono de s-roj *Rakitski* kaj *Avilov* kaj

ankaŭ donos 1 % el siaj enspezoj (ĉirkaŭ 15 rubl.). — S-ro *A. S. Kofman* ankaŭ promesas 1 % el sia salajro.

Kiel niaj legantoj scias el la n:o 2 de nia gazeto (p. 21), por la eldono de la propagandaj broŝuroj estis interalie uzita la konkursa mono (205 rubl.). Dezirante redoni tiun ĉi oferon al la esperantistoj, s-ro Zamenhof sendis senpage 1,500 ekz. da franca eldono al s-ro de Beaufront, 100 ekz. da sveda eldono al la Upsala Klubo kaj 10,160 ekz. en diversaj lingvoj — al s-ro Gernet, proponante al li fondi specialan "propagandan komitaton", ĉar en liaj manoj kolektiĝas la monaj oferoj de niaj amikoj. Ĉar oni ne povas fondi en Rusujo ian komitaton sen speciala permeso de la estraro kaj ĉar en Odeso estos baldaŭ fondita oficiala filio de la societo "Espero" en Peterburgo, kaj tiu ĉi filio povos sukcese anstataŭigi la propagandan komitaton, s-ro Gernet kun la helpo de s-ro Jivotovski, kiu nun konstante loĝas en Odeso, zorgos pri la regula propagandado ĝis tiam, kiam la filio de "Espero" estos konfirmita de la loka estraro, — kio sendube baldaŭ fariĝos. Pri sia agado li ĉiumonate raportos en nia gazeto.

Vojaĝoj de la esperantistoj.

S-ro *Langlet* jam finis sian vojaĝon en Rusujo kaj nun sin trovas en Italujo. — S-ro *Avilov* pro kelkaj kaŭzoj ŝanĝis sian vojon kaj anstataŭ viziti diversajn esperantistajn centrojn en Germanujo, li venis el Tifliso Odeson kaj el Odeso forveturis fervoje rekte en Parizon, kie sin trovas nun ankaŭ s-ro L. de Beaufront. — S-ro *Zinovjev* skribas al ni, ke li ĝis nun ne trovis akompananton, nek en Svedujo, nek en Norvegujo, nek en Finnujo. Li volonte vizitus almenaŭ la Finnujon sole, se iu el niaj finnaj amikoj konsentus helpi al li en la lando, kies lingvon li tute ne konas. — S-ro *Gernet* sciigas nin, ke pro hejmaj aferoj li devas prokrasti sian vojaĝon ĝis la fino de julio aŭ eĉ pli. — S-ro *Arduin*, komercisto el Bordeaux, intencas viziti en tiu ĉi somero Rusujon.

Novaj eldonoj.

— Eliris el presejo kaj estas dissendita al la abonantoj de la "Biblioteko" traduko de la komedio de L. Tolstoj: "*Unua brandfaristo aŭ kiel diableto meritis pecon da pano*". Tradukon faris kun permeso de la aŭtoro s-ro A. Burenkov.

— Eliris ankaŭ la sekvanta kajero de la "Biblioteko", kiu enhavas du rakontojn de talenta rusa verkisto V. Garŝin: "*Kvar tagoj*" kaj "*Attalea princeps*". Ambaŭ rakontojn tre bone tradukis s-ro Kazi-Girej. La malgranda antaŭparolo de la tradukinto pri la aŭtoro de tiuj ĉi rakontoj estas tre utila por nerusaj legantoj kaj estas dezirinde, ke aliaj tradukontoj imitu lian ekzemplon en tiu ĉi rilato.

— S-ro *Jivotovski* el Odeso sciigas nin, ke li nun finigas mallongan kondukanton por internacia stenografio (laŭ la sistemo de Gabelsberger), tiel aranĝitan, ke persono tute ne scianta stenografion, facile povos ellerni ĝin per tiu ĉi kondukanto. S-ro Jivotovski intencas sendi sian verkon por trarigardo al iu esperantisto, scianta la sistemon de Gabelsberger.

— S-ro *Kofman* sciigas nin, ke lia traduko de "Kain" post 2-3 semajnoj eliros el presejo de Tümmel. La verko estas presata en formato de la "Liro" kaj prezentas tre belan libreton.

Praktika uzado de l' lingvo.

S-ro I. Ostrovski (Jalta, Rusujo) skribas al ni:

“Hierau mi ricevis el Berlino de komercisto s-ro Gesell, ĉe kiu mi aĉetis mian instrumentaron, jenan respondon je mia esperanta letero al li: ‘... Dies (Esperanto) ist eine ausgezeichnete Sprache, welche man versteht, ohne sie gelernt zu haben. Wir haben Ihren Brief ohne Schwierigkeit lesen können und hoffen ihn demnächst in Esperanto auch beantworten zu können*’”.

Ni konsilas al niaj amikoj ĉiam uzadi la lingvon internacian ĉe iliaj komercaj komunikiĝoj, ĉe mendado de diversaj objektoj, ĉe abonado de ĵurnaloj k. t. p. Oni ne devas timi, ke la persono, al kiu oni mendas, ne komprenos la leteron, skribitan en Esperanto.

* * *

S-ro L. de Beaufront sciigas nin, ke la redaktoro de la ĵurnalo “L' Etranger”, s-ro E. Lombard, profesoro de la liceo Michelet, intencas en venonta aŭtuno anonci specialan kurson de nia lingvo por la dezirantoj. Tio ĉi estos la unua katedro de nia lingvo kaj s-ro Lombard, la unua redaktoro de nacia gazeto, kiu presas artikolojn en nia lingvo, estos ankaŭ la unua profesoro de Esperanto.

* * *

La redakcio de “*Almanah-Jeĵegodnik*” (Almanako-Jarlibro — la plej utila laŭ la multego da praktikaj sciigoj kaj unu el la plej vastigitaj rusaj kalendaroj. Kostas 1 rublon), eldonata de s-ro P. O. Jablonski, sciigis s-ron A. Pesockij (Kremenĉug, Rusujo), ke la alsendita de li en la redakcion artikolo pri la lingvo internacia, skribita de unu el la amikoj de nia afero, kiu kaŝis sian nomon sub la pseŭdonimo “*Pasanto*”, estos presita en la almanako de 1897 jaro. La artikolo konatigas la rusan leganton kun la historio de l' provoj krei lingvon internacian, poste parolas pri la du lingvoj ekzistantaj: Volapük kaj Esperanto, kaj pro la sendubaj preferoj de la lasta, jesigitaj per la opinioj de L. Tolstoj, Max Müller kaj Henry Philipps, konvinkas la leganton, ke la vortoj “lingvo internacia” kaj “Esperanto” estas sinonimoj, ĉar Esperanto ne havas nun indan kontraŭulon. Al ĉiu deziranta pli detale konatiĝi kun Esperanto oni rekomendas en la artikolo venigi de s-ro Zamenhof en Grodno la verkon N:o 85, kaj por ĉiuj, kiuj deziras observi la progreson de la lingvo, estos montrita la adreso de s-ro Gernet, ĉe kiu oni povas aboni la gazeton “Lingvo Internacia”. Kiam la almanako estos eldonita, ni sciigos pri tio niajn legantojn. Ni ne dubas, ke tiu ĉi artikolo havos bonajn rezultatojn.

* * *

S-ro Ostrovski sciigas nin, ke s-rino esperantistino *Elis. Oedman* veturas el Stokholm Jaltan por praktikadi masaĝon kaj svedan gimnastikon. Ŝi restos en Jalto, se trovos tie konstantan okupadon.

* * *

Por la gazeto ni ricevis sekvantajn oferojn: de s-ro A. Janicki — 0,50 r., de nekonata amiko el Rusujo — 0,70 r., de s-ro A. Zakrĵevski — 0,80 r.

* * *

*) Tio ĉi (Esperanto) estas eminenta lingvo, kiun oni komprenas, ne lerninte ĝin. Ni povis senpene tralegi Vian leteron kaj esperas, ke ni poste povos ankaŭ respondi en Esperanto.

En la N:o 6 de la gazeto "Linguist" ni trovis sekvantan respondon al nia peto klarigi pli precize, kiuj sciigoj, presitaj en nia gazeto *pri la programo* de "Linguist", estas tre malprecizaj*):

"Red. de l. i. p. e. . . ." Vp devas esti multe pliperfektigita (en kia maniero?! — "antau ol gi taugos en la rolo de lingvo internacia". Kie tio-ci estas dirita nur pri Vp—e ne ankau pri Esp.? "Lingvo ekzistanta kaj bone elprovita praktike" (tauga = uzebla) estas ankau Vp, eble ankoraŭ pli ka Esperanto!"


Ĉar en tiu ci respondo troviĝas *nenia vorto* rilate la programon de "Linguist", ni havas la rajton diri, ke la kulpigo, ke ni vastigas tre malprecizajn sciigojn pri "Linguist", estas maljusta. Ni ne disputos, ke Volapük estas "bone elprovita praktike", sed bedaŭrinde tiuj ĉi vortoj ne signifas "tauga = uzebla", kiel pensas la redakcio de "Linguist". Volapük estis bonege elprovita praktike kaj montriĝis nek tauga, nek uzebla por la buŝa parolado, laŭ la konfeso de s-roj volapükistoj mem (vidu ekz. la 8-an paĝon de la broŝuro de s-ro *Einstein*: "Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. 1. Volapük und Lingvo internacia").

* * *

† La 3-an de majo mortis subite en Stuttgart s-ro *Eugen Heintzeler*, aŭtoro de la projekto de lingvo internacia "Universala".

* * *

Pri la lingvo Esperanto parolla en la lasta tempo la sekvantaj gazetoj kaj ĵurnaloj: en la N:o 112 de la gazeto "*Kavkaz*", eldonata en Tifiso, estis presita la noto, ke en Tifiso formiĝas societo por vastigadi la lingvon Esperanto per eldonado de broŝuroj, tradukoj k. c. Tiu ĉi sciigo estis represita de grandaj rusaj gazetoj: "*Novosti*" (en n:o 147) kaj "*Novoje Vremja*". Post kelkaj semajnoj en "*Kavkaz*" estis presita la letero de s-ro *F. D. Avilov*, en kiu li sciigas, ke en Tifiso estis dissenditaj kaj disdonitaj 600 ekz. da propaganda broŝuro N:o 85, ke la ĉefaj librovendejoj de la urbo estas provizitaj per la lernolibroj kaj aliaj verkoj en Esperanto, ke en ĉiuj landoj nia lingvo estis rave salutata kaj ke kredeble en Tifiso ankau troviĝos homoj, dezirantaj labori por la efektivigo de la ideo de Esperanto. Por kunigi la fortojn s-ro Avilov petis tiujn ĉi homojn komuniki al li siajn adresojn. Kiam tiu ĉi letero estis presita, alia tifisa gazeto "*Tifliski Listok*" presis du artikolojn, en kiuj ĝi mokas la gazeton "Kavkaz", nian lingvon kaj s-ron Avilov. — S-ro *René Lemaire* transsendis al ni N:o 60 de "*Le Courrier des Timbres-Poste*", kie estas presita detala anonco pri lia baldaŭ eldonota libreto por filatelistoj, kun invito aboni la libreton. La sama anonco estas presita ankau en la N:o 75 de "*L' Annonce Timbrologique*", kiun al ni sendis ankau s-ro R. Lemaire. — En la N:o 7 de "*L' Etranger*" estas presita en nia lingvo letero de s-ro *A. Z.* el Poltava. Tiu ĉi letero salutas la ĵurnalon, kiel favorantan kaj noblan partianon de Esperanto, de tiu ĉi "agento plej potenca de civilizacio". En la sama numero sin trovas ankau la komenco de interesa artikolo de *Jan Janowski*: "Université autodidactique" (Universitato por memlernuloj). La artikolo estas presita en nia lingvo kun franca traduko de s-ro *L. de Beaufront*. Krom tio "L' Etranger" presas en ĉiu numero grandan anoncon pri nia lingvo.



*) Ni konservas la ortografion de "Linguist".

Faŭst.*)

Tragedio de *W. Goethe*.

Prologo en la ĉielo.

LA SINJORO. — ĈIELSPIRITOJ. — *Poste* MEFISTO.

Apudiĝas la tri ĉefanĝeloj.

RAFAELO.

Sonante belan melodion,
En frata mezo de mondar'
Kun tondro faras vojon sian
La suno en etera mar'.
Ĝi vekas forton en anĝelo,
Ĝi estas super la imag',
Kaj ĉio estas tiel bela
Kiele en l' unua tag'.

GABRIELO.

Rapide turnas sin la tero
Aperas vice sur la scen'
Mallumo nigra de infero
Kaj bela lumo de l' Eden'.
Kaj maro ŝaŭmas sur ŝtonaro,
Staranta kiel alta mur',
Sed tiujn ŝtonojn kun la maro
Fortiras l' universa kur'.

MIĤAELO.

De ter' al mar', de mar' al tero
Ventego portas sin kun bru',
Kaj ĉio restas sub mistera
Kaj reciproka mondinflu'.
Bruliĝas fulmo orkolora
Kaj tondro bruas en la spac',
Sed ni adoras Vin, Sinjoro,
En Via bono, Via pac'.

LA TRI ANĜELOJ.

Ĝi vekas forton en anĝelo,
Ĝi estas super la imag',
Kaj ĉio estas tiel bela
Kiele en l' unua tag'.

MEFISTO.

Ĉar Vi, Sinjoro, volas apudiĝi
Por ion pri la tero eksciigi,
Mi, kalkulante je l' favor',
Donita min tre ofte de l' Sinjor',
Kuraĝas ankaŭ tie ĉi montriĝi.
Pardonu, se en vortoj de demon'
Ne estos tre patosa tinto.
Vi ridus mem pri mia alta ton',
Se Vi ne estus sur ĉiela tron'
Delonge jam la ridon delerninta.
Pri suno kaj pri mondoj mi silentas.
Mi vidas nur ke homo sin turmentas;
Li, tiu eta dio de la ter'
Kun lia neŝanĝema karakter',
Li estas stranga en la sama grado
Kiele en komenco de l' kreado.
Li pli feliĉa — vere ne tre pli —
Sin sentus, se ne donus Vi al li
La ombro de l' ĉiela eco,
De li nomata "prudenteco".
Li uzas ĝin por esti sen disputo
Intere brutoj la plej brutaj.
Li ŝagnas esti — ke pardonu min
Por la ekzemplo Via Moŝt' Ĉiela —
Li ŝajnas esti longpied-libelo,
Fluganta ĉiam kaj sen fin'
Por ree fali al la ter' malbela
Kaj per malnova kant' amuzi sin.
Se li ankoraŭ kuŝus en trankvilo,
Sed ne! per nebarebla klin'
Li uzas ĉiam la okazon
Por ĉian sterkon ŝovi sian nazon.

*) Ni presas en nia gazeto fragmentojn el "Faust", kvankam tiu ĉi verko pli konvenus al la "Biblioteko", ol al la "Lingvo Internacia". Decidinte presi tiujn ĉi fragmentojn, la redakcio deziris 1) konatigi la legantojn kun tiu ĉi bela traduko, kiu ne povas esti baldaŭ finita kaj eldonita aparte, 2) doni la eblon al ĉiu deziranto kaj precipe al niaj germanaj amikoj fari diversajn rimarkojn pri ia precizeco de la traduko, por ke s-ro Kofman povu plibonigi ĝin en aparta eldono. La rimarkojn ni petas direktadi rekte al s-ro A. S. Kofman (Odessa, Neĵinskaja, 34). *Red.*

LA SINJORO.

Ĉu vi ne havas pli al mi aldiri?
Ĉu vi eterne volas plend-sopiri?
Ĉu bono ĉiam estas for de l' ter'?

MEFISTO.

Ĝi dronas tre perfekte en mizer'.
La homoj devas sin malbone senti,
Eĉ mi domaĝas ilin pli turmenti.

LA SINJORO.

Vi konas Faŭston?

MEFISTO.

La doktoron?

LA SINJORO.

Jes, mian sklavon!

MEFISTO.

Ha, tre strangan serv'-humoron
Elmontras tiu ĉi en sia vant'.
Nek manĝas li, nek trinkas homsimile,
En spacon portas lin la fantazi',
Kaj li rimarkus malfacile
Frenezon, kiu regas super li.
Li volas kapti stelojn de l' etero,
Li al terĝoj celas kun obstin',
Sed nek ĉiel', nek lia propra tero,
Nenio kontentigas lin.

LA SINJORO.

Li serĉas blinde, tamen kun persist'.
Mi lumos lin, li finos la laboron:
Vidante arbon, ĉiu ĝardenist'
Divenas tuj la frukton kaj la floron.

MEFISTO.

Ĉu vetos ni? Se plaĉus la Sinjoron,
Ne kontraŭagi mian bel-laboron,
Mi ĉarme metus lin sur mia voj',
Li donus sin al mi kun ĝoj'.

LA SINJORO.

Ĝis vivo en la homa brust' procesas,
Mi tion ĉi al vi ne malpermesas,
Ĝis homon vero interesas,
Ĝis tiam lin atakas eraraj'.

MEFISTO.

Mi dankas Vin. Min tedis mortintaĵ',
Mi tion ĉi delonge jam esprimis:

Freŝeco de rozeta vang',

Odoro de bolanta sang' —

Jen kion mi de ĉiam multestimis.
Ni estas, hom' kaj mi, duumvirat'
Precize kiel mus' kaj kat'.

LA SINJORO.

Nu, bone! Mi konsentas vin permesi.
Fortiru lin de lia dia font'
Kaj provu, delogante lin, sukcesi.
Vi tentu lin kaj estu al vi hont',
Se poste devos vi konfesi
Ke bona homo, eĉ se lia cel'
De li kaŝiĝas en mallum-mantel',
En si konscias veron de l' ĉiel'.

MEFISTO.

Bonege! baldaŭ ni ekvidos.
Mi la aferon ne malsaĝe gvidos.
Sed en okazo de prosper'
Ke, frapegita de turmento,
Li manĝu polvon sur la ter'
Kiele mia belkuzin' — serpento.

LA SINJORO.

Vi agu plen-libere, sen limigo.
Neniam min incitis demonej'.
El tuta spiritaro de neigo
La ruzegul' malplaĉis min malplej.
L' homaro estas tre maldiligenta,
Ĝin logas senagado, ripozad',
Kaj mi per vi ĝin tenas en fermento:
Spirito malkvieta, malkontenta
Utilos ĝin en dezirebla grad'. —
Sed vi, fidelaj anoj de ĉielo,
Vi, ĉiam ĝoju je la mondo bela.
Ricevu ĉiam per favor'
L' eternan ĝermon vivkreantan,
Sed la ŝanĝeman kaj nelongdaŭrantan
Detenu vi per pensoj en memor'.

(La ĉielo fermiĝas.)

MEFISTO.

Mi la grizulon vidas kun bonkor'
Kaj gardas min de vorto malagraba.
Tre plaĉas min, ke tia Grand-sinjor'
Parolas home eĉ al la diablo.

Vinkelo de Auerbah en Lejpcig.

Gaja kompanio.

FROŝ.

Neniu volas trinki pli?
Neniu ridas? Je kanajlo!
Mi tuj instruos vin grimacojn fari! Fi!
Vi nun similas al malseka pajlo,
Vi, ĉiam flamegantaj en orgi'.

BRANDER.

La kaŭzo estas sole vi:
Nenian farataĵon decan,
Nek frinezajon nek porkecon!

FROŝ (*versas sur lian kapon pokalon
da vino*).

Jen havas vi la unu kaj l' alian!

BRANDER.

Duobla porko!

FROŝ.

Vi ja volis tion!

ZIBEL.

Al pordo ĉian koleranton!
Nu, kune laŭtan rondo-kanton!
Kriegu, drinku! Ho! Hola!

ALTMAJER.

Ho ve!

Amikoj, al mi venas la pere!
Rapide vaton! Pro ĉielo!
Li min trapikis tra l' orelo.

ZIBEL.

L' arkaj' resonas bone, kaj des pli
Impresos nin la bas-potenco.

FROŝ.

Bonege! Al diablo tiun ĉi,
Venanta kun malhelp-intenco!
A! tara lara da!

ALTMAJER.

A! tara lara da!

FROŝ.

Ni estas en bonvoĉo, kantu ni!

(*Kantas*).

Ha, kiel, sankta regno Rom',
Vi ĝis hodiaŭ vivas?

BRANDER.

Fi! Politiko! Danku vi al Di'
Ke vin al Rom' ne ligas kunafero.
Mi ĉiam ĝojas je konsci',

Ke mi ne regas super ĝi
Nek estas ĝia kanceljero.
Sed mi, mi venas kun projekt' —
Ni devas havi ĉefon sendispute,
Elektu papon, agu bonkondute,
Vi scias, kia eco absolute
Nin devas gvidi en elekt'.

FROŝ.

(*Kantas*).

Vekiĝu, mia najtingal'!
Al ŝi vi mil salutojn portu.

ZIBEL.

For, for saluton! For kun amatin'!

FROŝ.

Salut' kaj kis'! Vi ne malhelpos min!

(*Kantas*).

Nun deriglu! Nokto venas.
Nun deriglu! Ŝi min prenas.
Nun alriglu! Venas tag'.

ZIBEL.

Jes, kantu nur kaj glori ŝin!
Mi miavice poste ankaŭ ridos.
Hieraŭ ŝi ektrompis min
Kaj morgaŭ ŝi vin ekperfidos.
Ke ŝi intrigu kun satan',
Kun griza kapro la Bloksbergoan',
Ke li flugante en inferon
Al ŝi eldiru bon-vesperon.
Por ŝi tro bona estas brava hom',
Por friponin' de speco tia.
Mi ŝin salutos per manier' alia,
Romponte ŝiajn vitrojn en la dom!

BRANDER (*frapas sur la tablon*).

Atenton! He! Aŭskultu min, sinjoroj,
Kaj vi konfesos tuj, ke min
Ne mankas tre konvenaj mondaj moroj.
Ĉar vi parolas kun obstin'
Pri amo kaj pri ama klin',
Mi tuj regalos vin per bela amuzaĵo,
Per kanto de plej nova mod',
Sed for la bruon kun klopod'
Kaj akompanu min per rekantaĵo'.

(Kantas).

En kelo loĝis bel-ratin',
Ĝi manĝis kun fervoro;
Kaj ĝia ventro al la fin'
Rondiĝis, egalinte sin
Al Lúter la doktoro.
Sed jen, trompita de venen',
Ĝi pepis, plendis pro ĉagren',
Kiele se ĝi amus.

LA ĤORO (*ĝojkrie*).
Kiele se ĝi amus.

BRANDER.
Ĝi kuris, saltis en dolor',
Multtrinkis el marĉaĵo,
Mordetis bretojn kun fervor',
Ĝi gratis ĉion kun stertor',
Sed ve! sen utilaĵo!
La turmentegoj pikis ĝin,
Ĝi saltis alte kaj sen fin',
Kiele se ĝi amus.

LA ĤORO.
Kiele se ĝi amus.

BRANDER.
Ĝi ekster si kaj sen kompren'
En kuirejon venis
Kaj falis tuj sur la kamen'
Konvulsianta kaj en sven',
Ĝin tremegado prenis.
Sed mokis la kuiristin':
"Ĝi pepas kaj turmentas sin
Kiele se ĝi amus".

LA ĤORO.
Kiele se ĝi amus.

ZIBEL.

Rigardu nur la ĝojon malsaĝulan!
Ĉi tio ŝajne estas granda sport':
Venenon porti en angulon
Por meti etan beston al la mort'

BRANDER.
Vi eble estas rat-patrono?

ALTMAJER.
Ho dika senharul-karikatur'!
La malfeliĉ' lin faras dolĉatona,
Ĉar en la ŝveliginta rat-figur'
Li sin rekonas en miniatur'.

FAŬST kaj MEFISTO.

MEFISTO.

Mi volas vin inviti antaŭ ĉio
Al unu gaja kompanio
Por vin konvinki, ke la bonhumor'
Facil-trovebla estas en la mondo.
Rigardu: por ĉi tiu viva ondo
Neniam mankas festo kaj ĝojkent'.
Kun eta sprito kaj kun grandkontent'
Turniĝas ili en malvasta rondo
Simile al juneta katidin',
Ĉirkaŭe propra vost' turnanta sin.
Ĝis ilin kapdoloro prenos
Kaj la kelisto en kredit' ne ĝenos,
Sen ĉeso ili ĝojos kaj festenos.

BRANDER.
Jen venas vojaĝantoj tien ĉi,
Tuj rekoneblaj pro la strangmieno.

FROŬ.
Certege, prava opini'!
Ke vivu Lejpeig, tiu ĉi edeno
De la eduko kaj de civiliz'!
Miniatur' ĝi estas de Pariz'.

ZIBEL.
Vi kion pri l' venintoj opinias?

FROŬ.
Silentu nur, mi nun nenion scias,
Sed tuj mi kiel denton de infan'
Per plen-pokalo en la man'
La vermojn el ilia nazo tiros.
Rigardu, kaj vi baldaŭ miros.
Ilia fiereco de mien'
Elmontras — kaj mi vidas ĝin sen pen' —
Ke ili estas el tre bona domo.
Ĉi tio estas aksiomo.

BRANDER.
Jes, ĉarlatanoj de plej bona spec'!

ALTMAJER.
Sen dubo.

FROŬ.
Nu, silenton, vi, ĉe l' tablo!
Atentu je l' baldaŭa gaja pec'!

MEFISTO (al FAŬST).
Ĉi tiu societo multagraba
Ne sentus la aleston de diablo,
Eĉ se li sidus sur ilia spin'.

FAÜST.

Sinjoroj, mi salutas vin!

ZIBEL.

Ni dankas kaj salulas tre bonkore.
(*Mallaŭte, rigardante Mefiston de flanko*).
Ĉu li ne lamas tiu ĉi fripon'!

MEFISTO.

Mi petas vin, permesu vi favore.
Al mi kaj tiu ĉi person'
Aliĝi nun al societo via.
Ĉar bona vino mankas tie ĉi,
Ĝin anstataŭos bela kompanio.

ALTMAJER.

Vi estas hom' kun postulema kor'.

FROŜ.

Ĉu venas vi de Ripaĥ nun, sinjor'?
Ĉu vi ne vespermanĝis ĉe Johano?*)

MEFISTO.

Ne, mi bedaŭre lin ne vidis nun,
Sed la bonhomo estas tute sana,
La lastan fojon, en aŭtun',
Mi vidis lin; laŭ sia uzo
Li paroladis pri la bela kuzo
Kaj petis min deteni en memor' —
Saluton al vi fari, bon-sinjor'.

(*Faras kliniĝon al Froŝ*).

ALTMAJER (*mallaŭte*).

Jen havas vi! Li vin travidas.

ZIBEL.

Kanajlo! li al ni la buŝon bridas!

FROŜ.

Atentu, mi alpaŝos tuj al li.

MEFISTO.

Se mi bonaŭdis, tie ĉi,
Vi kantis ĵus: en via kelo
L' arkaĵo estas resonanto bela,
Kaj ĉarme devas soni melodi'.

FROŜ.

Ĉu vi ne estas eble virtuozo?

MEFISTO.

Ne, mia art' ne estas serioza,
Mi estas sole diletan't'.

ALTMAJER.

Regalu nin per ia kant'.

MEFISTO.

Se vi deziras tion ĉi — per cento!

ZIBEL.

Sed freŝajn! la malnova elokvento
De niaj vortoj kaj muzik'
Nin tedis multpli ol kolik'.

MEFISTO.

Ni estas ĵus de Hispanuj' venantoj,
De l' bela land' de vino kaj de kantoj
(*Kantas*).

Ĉe unu bon-reganto
Loĝadis granda pul' —

FROŜ.

Atentu, pulo! Ĉu vi aŭdas? Pulo!
Tre dezirinda gasto kaj ĉarmulo!

MEFISTO.

(*Kantas*).

Ĉe unu bon-reganto
Loĝadis granda pul',
Ĝin amis per flamanta
Fajrkoro la reĝul'.
Li vokis en salonon
Tajloron kun postul'
Elkudri pantalonon
Kaj veston por la pul'.

BRANDER.

Sed estu al tajloro la aviz'
Ke li mezuru per preciz',
Kaj se li volas sian kapon savi —
La pantalon' ne devas faldojn havi.

MEFISTO.

Kaj baldaŭ ĝi kovriĝis
Per silko kaj velur';
Per kruco ornamiĝis
Kaj dronis en plezur'.
Ĝi estis apud trono,
Kaj ĝia famili'
Fariĝis ar-persono
Multinda je envi'.

Kaj jen la korteguloj
Kaj la reĝin' de l' tron'
Suferis de la puloj,
Ĉar estis la ordon'
Al ili fari ŝparon,
Sed ni — malbena pest'!
Dispremas la bestaron
Per unu unga gest'.

*) *Ripaĥ* (Rippach) estas nomo de vilaĝo apud Lejpcig. — *Johan* (Hans) kredeble estis en tempo de Goethe ia maldelikata homo.

LA ĤORO (*ĝojkrie*).
Dispremas la bestaron
Per unu unga gest'!

FROŜ.
Hurá! hurá! Ha, kia bela fin'!

ZIBEL.
Tiele estu ĉiam al la pulo!

BRANDER.
Eltendu fingron kaj dispremu ĝin!

ALTMAJER.
Ke vivu la libero kaj la vin'!

MEFISTO.
Mi estas por libero amantulo
Kaj volus per pokal' saluti ĝin,
Sed vi pardonu, via vino
Ja estas nek agrabla nek rafina.

ZIBEL.
Ĉi tio estas insultema plend'!

MEFISTO.
Se la kelist' ne prenis por ofend',
Mi donus al la kompanio bela
Pli bonan vinon el la propra kelo.

ZIBEL.
Nur donu, mi aranĝos tion ĉi.

FROŜ.
Sed estu ne malgranda la modelo:
Mi devas trinki kvanton da sitelo
Ke estu justa mia opini'!

ALTMAJER (*mallaŭte*).
Ĉi tio estas homoj de l' Rejnborde.

MEFISTO.
Alportu nur borilon!

BRANDER.
He, mokul'!
Ĉu staras jam bareloj poste l' pordo?

ALTMAJER.
Jen tie estas en angul'
Diversa aro-instrumento.

MEFISTO (*prenas la borilon, al Froŝ*).
Je kia vino estus vi kontenta?

FROŜ.
Mi ne komprenas vin, sinjor',
Ĉu vi posedas malsimilan specon?

MEFISTO.
Elektu ĉiu laŭ la propra kor'.

ALTMAJER (*al Froŝ*).
Vi sentas jam en buŝo voluptecon!

FROŜ.
Por agi laŭ la propra korkonsil',
Mi volas havi Rejnvinon:
Patrujo naskas bonon plej rafinan.

MEFISTO (*boras truon en la tabla rando
apud Froŝ*).

Alportu vakson — por ŝtopil'.

ALTMAJER.
Ĉu vi rekonas nun la ĉarlatanon?

MEFISTO (*al Brander*).
Kaj kion volas vi?

BRANDER.
Ĉampanon,
Ŝprucantan alte ŝaŭm-fontanon.

MEFISTO (*boras, dume unu kompaniano
faras vaksostopilon kaj ŝtopas
la truon*).

BRANDER.
Eviti fremdoaĵojn, tion ĉi
Al homoj ne permesas cirkonstancoj:
Bonaĵo ofte kaŝas sin de ni
En malproksimaj landoj kaj distancoj.
Se bon-German' deturnas sin de Francoj,
La francan vinon ĝoje trinkas li.

ZIBEL (*dum Mefisto proksimiĝas
al lia loko*).

Mi abomenas acidajon,
Mi volas dolĉan vinon nur.

MEFISTO (*boras*).
Vi havos baldaŭ Tokajajon.

ALTMAJER.
Sinjoroj, eble pro plezur' —
De ni vi volas fari mokindaĵon?

MEFISTO.
Ho ne! Kun tia noble kompani'
Ĉi tio estus granda malkonveno.
Rapide, diru tuj sen ĝeno,
Nu, kian vinon? Sen ceremoni'!

ALTMAJER.
De ĉia spec', de ĉiaj landoj,
Sed tamen tuj, sen long-demandoj.
(Ĉiuj truoj estas boritaj kaj ŝtopitaj).

MEFISTO (*kun strangaj gestoj*).

La vinberejo portas vinberaron,
Kaj kornojn la kaprid',
La vino estas suko laŭ elvid'
Kaj bera branĉo estas ligno.
La ligna tablo dank' al signo
Tuj povas doni vin-nektaron.
Atentu profundege je l' natur',
Alvenas mirindaĵo, kredu nur!
Por la ŝtopilojn, trinku vinan maron!

ĈIUJ

(*eltirinte la ŝtopilojn kaj preninte la dezi-
ritan vinon en siajn pokalojn*).

Ho, ĉarma fonto de belega vin'!

MEFISTO.

Nur gardu vin, ne preterverŝu ĝin.

ĈIUJ

(*Kantas*).

Ni estas kanibale feliĉegaj,
Kiele kvincent porkoj ĝojas ni!

MEFISTO.

La friponar' deligas sin de l' ĉeno
Kaj kias brue kaj sen ĝeno.

FAŬST.

Mi volus for!

MEFISTO.

Atendu je moment',
La bruta eco kaj la besta sent'
Aperos tuj en sia bela vero.

ZIBEL (*trinkas malsingardeme; la vino
fluas sur teron kaj fajriĝas*).

Mil pestoj! Fajro! brulas la infero!

MEFISTO (*jeĵurante la flamon*).

Trankvilon vi, amika element'
(*al la kompanio*).

Ĉi tiun fojon estis nur fajrero
De purigeja elokvent'.

ZIBEL.

Vi montras malplaĉeblian faron
Havontan tre malbonan honoraron.
Min ŝajnas — vi ne konas nin.

FROŬ.

Mi vin konsilas ne ripeti tion.

ALTMAJER.

Mi volus ke ni nun invitu lin
Forlasi pace nian kompanion.

ZIBEL.

He, kial vi, sinjoro bestofel'
Vi arogantas tiel arlekeni!

MEFISTO.

Silenton, malnovega vinbarel'!

ZIBEL.

Ha, forno-balail', azen-orel',
Vi volas nun ofendojn entrepreni?

BRANDER.

Atendu iom, la aer'
Odoras per survangoj kaj ekbatoj!

ALTMAJER (*eltiras ŝtopilon el la tablo;
fajro elsaltas al li*).

Mi brulas, brulas!

ZIBEL.

Sorĉo de infer'!

Ni lin regalu! Sen kompatoj!
(*Ĉiuj elmetas tranĉilojn kaj ĵetas sin
al Mefisto*).

MEFISTO (*kun seriozaj gestoj*).

Fals-eraro, vort-erar',
Venu al ĉi tiu ar'!
Ili agu senkonscie,
Estu tie kaj ĉi tie!

ALTMAJER.

Ho, kion mi nun vidas? Bela scen'!

FROŬ.

Ravantaj vinberejoj! Ĉarm-apero!

ZIBEL.

Mirinda vinberej-ĝarden'!

BRANDER.

Ho, kiaj branĉoj! Kia ben'!
Atentu je ĉi tiu vinobero!
(*Li kaptas la nazon de Zibel. La aliaj
faras tion saman, ĉiu kun la apud-
staranta, kaj levas siajn tranĉilojn*).

MEFISTO (*kun seriozaj gestoj*).

Iru for, vi, fals-imag',
Estu en okuloj tag'!
Sciu, drinkular' afabla
Kiel ŝercas la diablo.

(*Li malaperas kun Faŭst. La trinkuloj
depaŝas unu de alia*).

ZIBEL.

He, kio estis tio?

ALTMAJER.

Strang-okaz'!

FROŝ.

Ĉi tio estis via naz'?

BRANDER (*al Zibel*).

Kaj mi, mi miavice vian tenas!

ALTMAJER.

Min tra la korpo pikis ia frap'.

Alportu benkon, ĉar mi svenas.

FROŝ.

Sur mi turniĝas mia kap'.

ZIBEL.

Sed kie estas l' arlekeno?

Li kuŝas nun kun traborita fel'.

ALTMAJER.

Li iris for sen ia ĝeno

Kaj kuris tra la pordo de la kel',

Ĉevalrajdante sur barel'.

Mi sentas en piedaj plumb-multpezon,

Ĉu fluas nun ankoraŭ tiu vin'?

ZIBEL.

Li sendis al ni trompon kaj frenezon!

FROŝ.

Min ŝajnas ke ĝis nun mi trinkas ĝin.

BRANDER.

Sed kio faris sin de l' vinoberoj?

ALTMAJER.

De nun ke oni diru min —

Ne kredi je mirind-aperoj!

A. Kofman.



Eltiro el privata letero de d-ro Zamenhof al s-ro B.

presita kun permeso de ambaŭ korespondantoj.

Tradukis el lingvo rusa V. G.

... Vi demandas min, kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian kaj kia estis la historio de la lingvo Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis tiu ĉi tago? La tuta *publika* historio de la lingvo, t. e. komencante de la tago, kiam mi malkaŝe eliris kun ĝi, estas al Vi pli-malpli konata; cetere *tiun ĉi* periodon de la lingvo estas nun, pro multaj kaŭzoj, ankoraŭ neoportune tuŝadi; mi rakontos al Vi tial en komunaj trajtoj sole la historion de la *naskiĝo* de la lingvo.

Estos por mi malfacile rakonti al Vi ĉion tion ĉi detale, ĉar multon mi mem jam forgesis: la ideo, al kies efektiviĝo mi dediĉis tutan mian vivon, aperis ĉe mi — estas ridinde ĝin diri — en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis; mi vivis kun ĝi kaj eĉ ne povas imagi min sen ĝi. Tiu ĉi cirkonstanco parte klarigos al Vi, kial mi kun tiom da obstineco laboris super ĝi kaj kial mi, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj maldolĉaĵoj, ne forlasadis tiun ĉi ideon, kiel ĝin faris multaj aliaj, laborintaj sur la sama kampo.

Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno. Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj. Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj k. t. p. Tio ĉi ĉiam

forte turmentis mian infanan animon, kvankam multoj eble ridetos pri tiu ĉi “doloro pro la mondo” ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la “grandaĝaj” posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.

Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ne ĉio fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentigas al la infano; unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi, kvankam, kompreneble, sen iaj difinitaj planoj. Mi ne memoras kiam, sed en ĉia okazo sufiĉe frue, ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniu el la nun vivantaj nacioj. Kiam el la Bjelostoka reala lernejo (tiam ĝi estis ankoraŭ gimnazio) mi transiris en la Varsovian duan klasikan gimnazion, mi dum kelka tempo estis forlogata de lingvoj antikvaj kaj revis pri tio, ke mi iam veturado en la tuta mondo kaj per flamaj paroloj inklinados la homojn revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj por komuna uzado. Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al firma konvinko, ke tio ĉi estas neebila, kaj mi komencis malklare revii pri *nova*, arta lingvo. Mi ofte tiam komencadis iajn provojn, elpensadis artifikajn riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn, k. t. p. Sed homa lingvo kun ĝia, kiel ŝajnis al mi, senfina amaso da gramatikaj formoj, kun ĝiaj centoj da miloj de vortoj, per kiuj min timigis la dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tia artifika kaj kolosa maŝino, ke mi ne unufoje diradis al mi: “for la revojn! tiu ĉi laboro ne estas laŭ homaj fortoj”, — kaj tamen mi ĉiam revenadis al mia revo.

Germanan kaj francan lingvojn mi ellernadis en infaneco, kiam oni ne povas ankoraŭ kompari kaj fari konkludojn; sed kiam, estante en la 5-a klaso de gimnazio, mi komencis ellernadi lingvon anglan, la simpleco de la angla gramatiko ĵetiĝis en miajn okulojn, precipe dank’ al la kruta transiro al ĝi de la gramatikoj latina kaj greka. Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonaĵajn formojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko plej malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis pli serioze fordoniĝi al mia revo. Sed la grandegulaj vortaroj ĉiam ankoraŭ ne lasadis min trankvila.

Unu fojon, kiam mi estis en la 6-a aŭ 7-a klaso de la gimnazio, mi okaze turnis la atenton al la surskribo “*Švejcarskaja*”, kiun mi jam multajn fojojn vidis, kaj poste al la elpendaĵo “*Konditorskaja*”. Tiu ĉi “skaja” ekinteresis min kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi. Tiu ĉi penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la terurajn grandegulajn vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis rapide malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj.

“La problemo estas solvita!” — diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri sufiksoj kaj komencis multe labori en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tiu forto, kiu en lingvoj naturaj efikas nur parte, blinde, neregule kaj neplene. Mi komencis kompari vortojn, serĉi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn kaj ĉiutage mi forĵetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭigante tiun ĉi grandegon per unu sufikso, kiu signifis certan rilaton. Mi rimarkis tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure *radikaj* (ekz. “patrino”, “mallarĝa”, “tranĉilo” k. t. p.) povas esti facile transformitaj en vortojn *for-*

mitajn kaj malaperi el la vortaro. La meĥaniko de la lingvo estis antaŭ mi kvazaŭ sur la manplato, kaj mi nun komencis jam labori regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam havis skribitan la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.

Tie ĉi mi diros ĝustatempe kelkajn vortojn pri la materialo por la vortaro. Multe pli frue, kiam mi serĉis kaj elĵetadis ĉion senbezonan el la gramatiko, mi deziris uzi la principojn de la ekonomio ankaŭ por la vortoj kaj, konvinkita, ke estas tute egale, kian formon havos tiu aŭ alia vorto, se ni nur *konsentos* ke ĝi esprimas la donitan ideon, mi simple *elpensadis* vortojn, penante, ke ili estu kiel eble pli mallongaj kaj ne havu senbezonan nombron da literoj. Mi diris al mi, ke anstataŭ ia 11-litera "interparoli" ni tute bone povas esprimi la saman ideon per ia ekz. 2-litera "pa". Tial mi simple skribis la matematikan serion da plej mallongaj, sed facile elparoleblaj kunigoj de literoj kaj al ĉiu el ili mi donis la signifon de difinita vorto (ekz. *a, ab, ac, ad, ... ba, ca, da, ... e, eb, ec, ... be, ce, ... aba, aca, ... k. t. p.*) Sed tiun ĉi penson mi tuj forĵetis, ĉar la provoj kun mi mem montris al mi, ke tiaj elpensitaj vortoj estas tre malfacile ellerneblaj kaj ankoraŭ pli malfacile memoreblaj. Jam tiam mi konvinkiĝis, ke la materialo por la vortaro devas esti romana-germana, ŝanĝita nur tiom, kiom ĝin postulas la reguleco kaj aliaj gravaj kondiĉoj de la lingvo. Estante jam sur tiu ĉi tero, mi baldaŭ rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandegan provizon da pretaj jam vortoj internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia, — kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi trezoron.

En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli preta, kvankam inter la tiama "lingwe uniwersala" kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. Mi komunikis pri ĝi al miaj kolegoj (mi estis tiam en 8-a klaso de la gimnazio). La plimulto da ili estis forlogitaj de la ideo kaj de la frapinta ilin neordinara facileco de la lingvo, kaj komencis ĝin ellernadi. La 5-an de decembro 1878 ni ĉiuj kune solene festis la sanktigon de la lingvo. Dum tiu ĉi festo estis paroloj en la nova lingvo, kaj ni entuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis la sekvantaj:

"Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá."

(En la nuna Esperanto tio ĉi signifas: "Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuiĝi devas").

Sur la tablo, krom la gramatiko kaj vortaro, kuŝis kelkaj tradukoj en la nova lingvo.

Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo. Mi estis tiam ankoraŭ tro juna por eliri publike kun mia laboro, kaj mi decidis atendi ankoraŭ 5—6 jarojn kaj dum tiu ĉi tempo zorgeme elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike. Post duonjaro post la festo de 5-a de decembro ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. La estontaj apostoloj de la lingvo provis paroleti pri "nova lingvo" kaj, renkontinte la mokojn de homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon, kaj mi restis tute sola. Antaŭvidante nur mokojn kaj persekutojn, mi dicitis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron. Dum 5¹/₂ jaroj de mia estado en universitato, mi neniam parolis kun iu pri mia afero. Tiu ĉi tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝadi

miajn pensojn kaj planojn mi preskaŭ nenie estadis, en nenio partoprenadis, kaj la plej bela tempo de la vivo — la jaroj de studento — pasis por mi plej malgaje. Mi provis iafoje min distri en la societo, sed sentis min ia fremdulo, sopiris kaj foriradis, kaj de tempo al tempo faciligadis mian koron per ia versaĵo en la lingvo, prilaborata de mi. Unu el tiuj ĉi versaĵoj (“Mia penso”) mi metis poste en la unuan eldonitan de mi broŝuron; sed al la legantoj, kiuj ne sciis, ĉe kiaj cirkonstancoj tiu ĉi versaĵo estis skribita, ĝi ekŝajnis, kompreneble, stranga kaj nekomprenebla.


Dum ses jaroj mi laboris perfektigante kaj provante la lingvon, — kaj mi havis sufiĉe da laboro, kvankam en la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke la lingvo jam estas tute preta. Mi multe tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike. Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, korekti kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian, dume en la teorio, ĉio aparte kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. Tiaj objektoj, kiel ekz. la universala prepozicio “je”, la elasta verbo “meti”, la neŭtrala, sed difinita finiĝo “aŭ” k. t. p. kredeble neniam enfalus en mian kapon teorie. Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la praktiko senbezona balasto; tiel ekz. mi devis forĵeti kelkajn nebezonaĵajn sufiksojn. En la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke estas al la lingvo sufiĉe havi gramatikon kaj vortaron; la multpezecon kaj malgraciecon de la lingvo mi alskribadis nur al tio, ke mi ankoraŭ ne sufiĉe bone ĝin posedas; la praktiko do ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekapteblan “ion”, la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan “*spiriton*”. (La nesciado de la spirito de la lingvo estas la kaŭzo, kial kelkaj esperantistoj, tre malmulte legintaj en la lingvo Esperanto, skribas senerare, sed en multepeza, malagrabla stilo, — dume la esperantistoj pli spertaj skribas en la stilo bona kaj tute *egala*, al kiu ajn nacio ili apartenas. La spirito de la lingvo sendube kun la tempo multe, kvankam iom post iom kaj nerimarkite, ŝanĝiĝos; sed se la unuaj esperantistoj, homoj de diversaj nacioj, ne renkontus en la lingvo tute difinitan *fundamentan* spiriton, ĉiu komencus tiri en sian flankon kaj la lingvo restus eterne, aŭ almenaŭ dum tre longa tempo, malgracia kaj senviva kolekto da vortoj.) — Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte *pensi* en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo, kun kiu mi havas la aferon en tiu aŭ alia minuto, kaj ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaĵ influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.

Ankoraŭ unu cirkonstanco igis min por longa tempo prokrasti mian publikan eliron kun la lingvo: dum longa tempo restis nesolvita unu problemo, kiu havas grandegan signifon por neŭtrala lingvo. Mi sciis, ke ĉiu diros al mi: “via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam la tuta mondo ĝin akceptos; tial mi ne povas ĝin akcepti ĝis tiam, kiam ĝin akceptos la tuta mondo”. Sed ĉar la “mondo” ne estas ebla sen antaŭaj apartaj “unuoj”, la neŭtrala lingvo ne povis havi estontecon ĝis tiam, kiam prosperos fari ĝian utilon por ĉiu aparta persono sendependa de tio, ĉu jam estas la lingvo akceptita de la mondo aŭ ne. Pri tiu ĉi problemo mi longe pensis. Fine la tiel nomataj sekretaj alfabetoj, kiuj ne postulas, ke la mondo antaŭe ilin akceptu, kaj

donas al tute nedediĉita adresato. la eblon kompreni ĉion skribitan de vi, se vi nur transdonas al la adresato la ŝlosilon, — alkondukis min al la penso aranĝi ankaŭ la lingvon en la maniero de tia "ŝlosilo", kiu, enhavante en si ne sole la tutan vortaron, sed ankaŭ la tutan gramatikon en la formo de apartaj, tute memstaraj kaj alfabete orditaj elementoj, donus la eblon al la tute nedediĉita adresato de kia ajn nacio tuj kompreni vian leteron.

Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi komencis jam pensi pri la publika eliro kun mia laboro. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro ("D-ro Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro"), kaj komencis serĉi eldonanton. Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldolĉan praktikon de la vivo, la finanĉan demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali. Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigis mian broŝuron por eldono kaj fine — rifuzis. Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je "flankaj aferoj"; mi sentis, ke mi metas sur la karton tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon kaj... mi transiris Rubikonon.

Lazaro Ludoviko Zamenhof.



El Heine.

I.

Dolĉe pikas min tra kor'
Sonoj de aero.
Sonu vi, printempa ĥor',
Sonu sur la tero;
Sonu, mi al tiuj ĉi
Floroj vin deputas;
Se vi vidos rozon, vi
Diru, mi salutas.

II.

Se ni edziĝos, mia kor',
Mi vin per unu fojo
Ĉirkaŭos per plezuramas',
Per gajo kaj per ĝojo.
Kaj se vi estos en koler',
Mi vin ne kontraŭiĝos,
Ne moku miajn versojn nur:
Mi tiam eksedziĝos.

III.


Amikeco, amo, oro,
Oni laŭdas vin en ĥoro,
Mi vin laŭdis, serĉis ĉie,
Kaj mi trovis vin nenie.

IV.

Ke mi vin amas, mopso,
Vi scias, diablan':
Pro mia sukerdono
Vi lekas min sur man'.

Vi volas esti hundo
Kaj ne deziras pli,
Nur miaj homamikoj
Sajniĝas pli ol vi.

A. Kofman.





EN NEVSKI.

En Peterburgo.

La horloĝo en la katedralo Kazanski ĵus sonas kvar, kiam mi en bela junia mateno sola promenas sen celo sur la stratoj de S.-Peterburgo. Aŭ se mi havas ian celon, tio estas nur vidi kiel dormas la granda *metropolo*. Oni devas preni l' okazon dum ĝia flugado, ĉar Peterburgo ne dormas longtempe. La norda nokto de somero ja invitas mem ŝanĝi la nokton en tagon kaj tio ĉi estas invito, kiun akceptas tre volonte la peterburganoj. — Sed nun ĵus komencis la tempeto, en kiu iom post iom ekdormiĝis la nokta bruoj kaj ankoraŭ ne vekigis la klopodoj de l' tago. Ia sola piediranto ekvidiĝas en la fino

de l' stratoj kaj ia dormema izvoŝ-ĉiko (veturigisto) malrapide kondukas sian lacan kvazaŭĉevalon. La veturilo preskaŭ sensone rulas, ĉar la radoj estas, kiel ofte tie ĉi, vestitaj per kauĉukaj ringoj — sed la frapado de l' hufoj sur la strato tamen vekigas tie kaj tie iun *dvornik'on*, kiu dormetante sidas en ia angulo antaŭ la domo, kiu estas sub lia gardo. Videble li sonĝis pri ia Elizio, en kiu li ne bezonas balai la straton kaj kie li povas pace dormi ĉiun nokton — kaj li devigas forte froti siajn okulojn por povi reveni en la multmaniere krudan efektivecon. Sed ĉar videble nenia danĝero ekzistas, li tiras la ŝafpelton pli bone ĉrikaŭ si, turniĝas al alia flanko kaj



DVORNIK.

denove eniras en sian Elizion — forte ronkante.

Sed dum mia promeno mi fine atingis la *Marmoran palacon*, kie mi haltas sur la surbordo apud la maldekstra Neva-bordo. La suno jam rompas la matenajn nebulojn, kiuj kiel ia vualo pendas super la urbo kaj rivero, kaj briletas gaje en la saltantaj ondetoj de l' grandega *Neva*. Sur l' alia bordo de l' larĝa rivero sin montras al mi la malaltaj konturoj de l' antikva Peter-Paŭl-fortikaĵo, el kies mezo la Peter-Paŭl-katedralo levas sian gracion turon plej alte inter ĉiuj preĝejoj en la urbo. Pinta kaj brilanta kiel origita kudrilo ĝi sin levas, portante tie supre grandegan anĝelan figuron kunflugiloj. — Tiu preĝejo nun estas ia speco de *Panteon*, en kiu preskaŭ ĉiuj rusaj *caroj*, de Petro I. estas enterigitaj, kaj ĝi ankoraŭ estas tute plena de la sennombraj florkronoj, kiuj el diversaj lokoj, precipe el Rusujo kaj Francujo, estis senditaj al la enterigado de Aleksander III.

De la pinta tegmento de la Peter-Paŭl-katedralo glitas la rigardo super *Neva* ĝis Vasili Ostrov, granda insulo inter du brakoj de *Neva*, sur kiu komerco kaj navigado en Peterburgo havas sian centron kaj ĉefan lokon. La borso tie en la pinto de l' insulo, malbela konstruaĵo en kvazaŭgreka stilo, ŝajnas preskaŭ bela en la matena lumigado, kiu kolorigas ĝiajn blankajn murojn ĉarme or-ruĝaj kaj donas al la konstruaĵo pli molajn konturojn ol sub la radioj de l' hejta suno de tagmezo. Mallonge poste ekvidiĝas la grandegaj masoj de konstruo de l' Scienca akademio, la Oficira lernejo kaj l' Akademio de artoj, — inter la fumtubo kaj mastoj de l' vaporŝipoj, kuŝantaj apud la surbordo.

Sed kiam la suno leviĝas sur ĉielo, jam ankaŭ komencas la pulsoj de l' Neva-urbo pli forte bati. Veturiloj de brulaĵo kaj verdaĵo, kiujn tires grandaj blankaj ĉevaloj kun la karakteristaj grandaj altaj pentritaj jugoj ek-krakegas tie kaj ie sur la malbonaj stratoj de Peterburgo; la *dvornikoj* jam ne povas plu dormi pace pro la bruo, — unu post l' alia ekleviĝas, skuas sian nekombitan kapon kaj ekserĉas la balailon por povi komenci la matenan okupadon.

Jen apud la surbordo sur la "flanko viborga" aŭdiĝas kanto de malkleraj viraj voĉoj — ia dekduo da havenlaboristoj kiuj komencas sian laboron kun komune kantita kanto. Ili vidiĝas sufiĉe pitoreskaj en siaj fortkoloraj ruĝaj kaj bluj ĉemizoj kun zono ĉirkaŭ la talio.

Baldaŭ komencas sian iradon la malgrandaj vaporŝipetoj sur la *Neva*; estas amaso da ŝipetoj, kiujn pozedas ia finna societo kaj sur kiuj ankaŭ oficas preskaŭ nur finnoj. Ne malmultaj el ili komprenas mian lingvon — la svedan, sed, kompreneble, neniu Esperanton. Kiam fariĝos saĝa nia mondo? — Cetere tiuj ŝipetoj estas eminente bone kondukataj. Dum 25 jaroj ili suriradis ĉiujn brakojn de la *Neva* kune kun la kanaloj en Peterburgo — Fontanka, *Mojka* k. c. — sen pli ol unu malfeliĉaĵo. Bona pruvo de l' taŭgeco kaj konfidindeco de l' finna gento.

Tiel, post du horoj de dormetado (kvazaŭdormo) denove jam vekigis la grandurba vivo. Izvoŝikoj vestitaj en la tradicia longa blua mantelo kun zono ĉirkaŭ la talio kaj sube dika ŝafopelto, kondukas sur la stratoj en centoj kaj miloj siajn veturilojn kun aŭ sen kauĉukaj ringoj en dormema kvazaŭ-rampado aŭ en kuraganta galopo — laŭ emo kaj deziro, en Peterburgo oni havas rajton veturi kiel ajn rapide, ŝajnas. Tute ne malofte oni vidas paron da nigraj ŝatimitaj ĉevaloj en plej sovaĝa galopo trakuregi *Nevski prospekt*, la pulsarterio kaj plej granda strato de Peterburgo. Strange, ke tiel malofte okazas malfeliĉaĵoj, — sed la *izvoŝikoj* ordinare estas nesuperoble lertaj kaj cetere ili tiel freneze kriegas, ke oni devas esti surda, se oni ne aŭdas kaj sin gardas.

En junio cetere la strata vivo en Peterburgo estas nenio, kompare la vintron kaj printempon. La plej granda parto de la nobelularo kaj riĉularo jam en komenco de l' monato forloĝas el la urbo (vere ne strange!) al siaj somerloĝejoj ĉirkaŭ *Viborg* apud la Finna golfo aŭ suden al *Carskoje Selo* k. c. — kaj kiam ĉiuj la elegantaj ekipaĝoj, kiuj alie ornamadas la stratojn Peterburgajn, forestas, tiam ŝajnas la tuta urbo loĝita de izvoŝĉikoj; estas ĉefe nur iliaj komikaj, grasaj, dorsokurbaj aperaĵoj, kiuj donas al Peterburgo karakteristikan stampon; cetere ĝi sufiĉe similas tion, kion oni vidas ekz. en Stokholmo.

Kaj vere, Peterburgo apenaŭ estas rusa urbo; ĝi estas, en tutaj almenaŭ, preskaŭ okcitendeŭropa. Vera estas ke en privata vivo, oni povas trovi multajn trajtojn tute rusajn, sed la ekstero de P. estas tute kosmopolita. Kaj tiu urbo ankaŭ enhavas en si milojn da fremdlandanoj: finnoj, estoj, germanoj, ne malmultaj svedoj, francoj k. c. La finnoj ordinare loĝas en la urbparto *Viborgskaja storona*, norde de Neva, kie oni ofte inter rusaj mujikoj (vilaĝonoj) kaj



nigrokulaj ciganoj vidas la konfidajn bluajn okulojn kaj la "linan" hararon de ia *tavasto* aŭ unu brunokulan, brunkoloran, brunharan individuon el *Karelujo*.

La plej "highest fashion" parton de l' urbo oni trovas sude de l' Neva. Tie, laŭlonge la bordo de Neva kaj apud la glora Nevski Prospekt kuŝas preskaŭ ĉiuj luksaj konstruaĵoj de Peterburgo. Ili ne estas malmultaj; oni nomas Peterburgon la "urbo de palacoj", kaj ĝuste, ĉar ilia nombro, kiel tiu de l' preĝejoj ŝajnas nekalkulebla. Sed, kun malmultaj esceptoj, ĉiuj estas malstilaj kaj malinteresaj kaj ne tuŝas la rigardanton. La *katedralo de Isak'* kun ĝia grandegula, tute origita kupolo kaj ĝiaj kolosaj kolonoj, *monolitoj* el polurita finna granito, vere donas la potencan impreson de grandeco kaj forto, kiun oni postulas de la ĉefa preĝejo en la ĉefurbo de Rusujo, sed mankas al tiu ĉi konstruaĵo, kiel al la plejmulto da rusaj preĝejoj, la nobla mezureco, kiu sola povas doni samtempe gravecon kaj ĉarmon. — La saman oni povas diri pri la internaĵo de l' preĝejo; tie estas sennombraj kostajoj, multekostaj kaj belaj or-kaj arĝentaĵoj, amasoj da juveloj, — sed ĉio estas

amasigita sen gusto, sen la penso pri harmonia tutajo. — La dua granda katedralo en Peterburgo estas tiu, kiu nomiĝas la *Kazana*; kiel la leganto eble scias ĝi estas imitaĵo de l' granda San Piedro-preĝejo en Romo; ĝi ne estus sen impozo, se ĝi starus libere sur ia monteto, sed nun enŝlosita preskaŭ ĉieflanke de aliaj konstruaĵoj sur malgranda placo apud Nevski, ĝi ne impozas la rigardanton. En la intero oni trovas belegajn kolonojn kaj amason da multekostaĵoj.

Inter la palacoj sin distingas la "Vintra palaco" kaj l' "Ermitaĝo" — l' unua per sia grandegeco, l' alia per sia nobla pura formo, kaj ĝia brila, arta enhavo. La Vintra palaco spegulas siajn longajn flavajn murojn en l' akvo de l' Neva. La ekstero ne estas de pli alta arta indo, sed l' intero, kontraŭe estas tiom pli altiranta. Kune kun mia kolego de vojaĵo, mi tie pasigis kelkajn ĝuplenajn horojn, ĉirkaŭirante kaj rigardante la amason da artaj objektoj de ĉiuj specoj, kiuj tie sin trovas en nekalkulebla nombro — bele kaj arte ordigitaj kaj tiel aranĝitaj, ke oni en ĉiu minuto sentas la senton de ĉambro, ne de muzea salono.

Tute flanke de l' Vintra palaco ni trovas l' Ermitaĝon, belan konstruaĵon en greka stilo, al kiu faris fundamenton Jekaterina II, sed kion pretigis Nikolaj' I kun nepri-skribebla brilo. Tien ĉi estas dum daŭro de l' jaroj amasigitaj per la potencaj reĝoj de l' granda car-regno amasoj da artaj objektoj de plej granda indo, tiel ke nun la kolektaĵo de l' Ermitaĝo estas kalkulita kiel unu el la plej ĉefaj en la mondo. Precipe estas la galerio de pentraĵoj malordinare riĉa kaj bela, enhavanta grandan nombron da verkoj de l' plej grandaj majstroj de l' mondo. Mi tie ĉirkaŭmigris senlace dum horoj, de Rafael al Tician, de Tician al Murillo, al Rembrandt, van Dyck kaj Teniers kaj multaj aliaj inter la "klasikoj." Italoj kaj holandoj, francoj, germanoj kaj hispanoj — preskaŭ ĉiujn naciojn mi tie trovis.



TARTARO, AĈETANTA MALNOVAJN VESTAĴOJN.

La artistoj de Rusujo mem tamen ne estas tro multnombre reprezentitaj en la muzeo, sed anstataŭe ni de iliaj manoj trovas tie kelkajn verkojn, kiujn oni devas meti inter la perloj de l' kolektaĵo. Tiaj mi kalkulus la pentraĵon da Ajwaizowski: "Ventego sur Maro Nigra", kies ŝaŭmaj, siblegantaj, travideblaj ondoj estas prezentitaj kun nesuperebla realismo — kaj la "Tanco de arbaraj nimfetoj" de Marovski kun ĝiaj ludantaj ĉarmaj virin-figuroj — kaj fine "Kristus" kaj "Mefistofeles" de l' granda skulptisto Antokolski. Ne ofte "Kristus antaŭ siaj juĝistoj" estas prezentita tiel sublime, tiel en samfoje ideala kaj realisma maniero, kiel en la nomita skulptaĵo, — kaj neniam do la reĝo de l' profundaĵoj trovis komprenulon, kiu povis pli nature redoni la demonan altecon kaj la malvarman trankvilon en liaj trajtoj, tamen ne formetante la esprimon de la kvazaŭ personigita ruzegeco, kiun ni al kutimiĝis vidi en la figuraĵoj, prezentantaj lin.

La kolektaĵoj de l' Ermitaĝo, kiuj enhavas la plej diversajn kaj plej interesajn objektojn (interalie ankaŭ amason da precipe ŝatindaj antikvaĵoj el

la grekaj kolonioj en Krim) apartenas al la privata havaĵo de l' caroj. Kaj ili estas tiel amindaj permesi la publikon ĉiu ajn tago dum 5 horoj migradi en ĝiaj belaj salonoj. Sed sendanke, kiel ŝajnas, — ĉar almenaŭ dum miaj vizitoj en la muzeo mi tie migris multthore — preskaŭ sola. La pleja nombro de l' vizitantoj ŝajnis fremduloj; multaj peterburganoj, kiuj almenaŭ *volas* esti kalkulitaj inter la vere kleraj, eĉ unu fojo ne vizitis la Ermitaĝon.

Kion do ili faras? Ili havas aliajn amuzajojn. Vespere ili en milnombroj vere fluadas al la ĉiuj amuzejoj, kiuj estas unu apud l' alia sur la insuloj apud la buŝo de Neva — Livadia, Arkadia, Krestovski kaj kiel ajn ili nomiĝas. Tiel ili sidas la tutan nokton trinkante kaj fumante kaj rigardante la "vidindaĵojn" de l' someraj teatroj. Tiuj ĉi estas sufiĉe simplaj, kaj oni malfacile komprenas, kiel ili povas logi publikon, kiu horo post horo sidas amuzante sin per ĉiuj numeroj de l' programo. Le plej bona de tiuj lokoj sendube esta la Zoologia ĝardeno, kaj tie ankaŭ la publiko estas iom malpli "duba." Mi tie pasigis unu vesperon kune kun ia finna amiko kaj unu juna georgiano (el Gruzujo) kun lia patrino kaj fratino kaj tiam mi povis vidi, kio plaĉas al la Peterburga gusto. Unue oni prezentis al la rigardantoj grandan "fe-aĵon", kiu estis akceptata kun freneza aplaŭdado, precipe post la lasta akto, en kiu sin montris la "Malbonulo" mem, kaj ĉiuj liaj servantoj de diversaĝo faris grandegan "dancon de l' profundaĵo" sub elektra lumo de ŝanĝanta koloro. La baletoj de l' rusoj estas sufiĉe konata kiel neordinare bela kaj vere estis amuzante vidi la malgrandajn demonetojn kiuj, vestitaj en fantaziaj multkoloraj vestaĵoj kaj kun grandaj ruĝaj aŭ bluaj maskoj, svingis sin unu kun la alia en nesuperebla ĉarmo. — Nun oni vidis akrobataĵon de precipe lertaj "aerartistoj"; poste kantis aro da junulinoj, kiuj nomiĝis ciganinoj; poste saltante venis unu rusa vilaĝa junulo kun sia man-orgeneto (rusa muzikilo) kaj kantis kantetojn, kiuj kredeble estis tre amuzantaj — por tiuj, kiuj ilin komprenis. Kaj tiel plu senfine.

Sed tion similan oni vidas en ĉia lando, en ĉia urbo kaj ion specifike rusan oni ne trovis inter ĉio tio. Se vi *volas* vidi ion vere rusan, iru al Moskvo, kiel ankaŭ ni faris, mi kaj mia kolego, — kaj estu konvinkita, ke vi ne plendos la vojaĝon de 600 km el "la kapo de Rusujo" al "la koro de Rusujo."

Valdemar Langlet.

Kalkula raporto.

Mi permesas al mi nun doni kalkulan raporton pri la mono, kiu kolektiĝis ĉe mi en la daŭro de la lastaj 1 1/2 jaroj, t. e. de la tempo de mia lasta kalkula raporto en la "Esperantisto" n:o 2 de 1895.

Laŭ la tiama raporto kolektiĝis ĉe mi ĝis februaro de 1895 jaro 80,94 rubloj, en februaro 1895 al tio aliĝis 19,06 r., ricevita de du anonimaj amikoj (por rondigi la sumon), kaj mi sekve havis la sumon de 100 rubloj. Tiu ĉi sumo estis difinita por konkursa premio; sed ĉar pro konataj cirkonstancoj la konkurso ne povis efektiviĝi, tial, laŭ voĉdonado farita inter la membroj de la konkursa komitato (vidu "Lingvo Internacia" N:o 2, paĝoj 20—21), mi uzis la monon por eldonado de propagandaj broŝuroj, pri kiuj mi malsupre donas kalkulon.

Krom la supre diritaj 100 rubloj, ĉe mi kolektiĝis poste ankoraŭ la sekvantaj sumoj:

A) De marto ĝis aŭgusto 1895 mi ricevis (kaj publikigis en "Esperantisto"):

per d-ro I. G. oferojn de diversaj personoj, prezentantajn kune la sumon de	52,00.
de s-rino M. Sereda	1,05.
de s-ro K. Hübert	2,00.
de s-ro W. H. Trompeter por la signoj de poŝto, kiujn li ricevis de diversaj personoj	12,00.
de d-ro D. Marignoni	1,20.
de s-ro Seleznet	1,00.

B) De aŭgusto 1895 ĝis nun mi ricevis (kaj publikigis en "Lingvo Internacia"):

de d-ro D. Marignoni	0,90.
de s-ro I. Lojko	2,70.

Kune r. 72,85.

Ĉesigo de "Esperantisto" en 1895. Dank' al konataj cirkonstancoj mi en la mezo de 1895 devis ĉesigi la eldonadon de la gazeto "Esperantisto." Ĉar la plej granda parto da abonantoj pagis jam por la tuta jaro, tial, laŭ kalkulo donita en n-ro $\frac{5}{6}$ de "Esperantisto" 1895 mi restis ŝulda al ĉiu rusa abonanto po 40 kop. kaj al ĉiu abonanto ekster Rusujo po 58 kop. La plej granda parto da abonantoj sekvis mian inviton en n-ro $\frac{5}{6}$ de "Esperantisto" 1895 kaj venigis al si de mi aŭ returne sian monon, aŭ diversajn librojn, aŭ kovris per tiu ĉi sumo sian ŝuldon por la "Biblioteko" k. t. p. Sed 67 abonantoj ĝis nun ne respondis mian demandon kaj ne sciigis min, kion mi devas fari kun la mono, kiun mi restis ŝulda al ili. Tial mian ŝuldon al tiuj 67 personoj, (kiu prezentas kune la sumon de 32 rubloj) mi rigardas kiel oferojn por la celoj de nia afero kaj mi almetas ilin al la alia mono, kiu kolektiĝis ĉe mi por nia afero kaj pri kiu mi donas kalkulan raporton.

Sekve ĉio kune, de mia lasta kalkula raporto ĝis nun, ĉe mi kolektiĝis:

a) de la estinta konkursa premio	100,00.
b) diversaj oferoj privataj	72,85.
c) nereprenita mono de la estintaj abonantoj de "Esperantisto" en 1895	32,00.

Ĉio kune r. 204,85.

De la propaganda broŝureto en diversaj lingvoj mi presis ĝis nun 28,000 ekzemplerojn kaj pagis por la presado de ili ĉirkaŭ 420 rubloj, t. e. mezo-nombre po $1\frac{1}{2}$ kopekoj por ekzemplero. Sekve la supre diritaj 204,85 r. donis al mi la eblon presi ĉirkaŭ 13,660 ekzemplerojn, kaj la restajn 14,340 mi presis je mia propra kalkulo kaj risiko, esperante kovri la elspezojn iom post iom per vendado de la 14,340 ekzempleroj. La 13,660 ekz., presitajn por la mono fremda (t. e. por la oferoj, kiuj kolektiĝis ĉe mi) mi transdonis senpage, por senpaga disdonado kaj dissendado en la celoj de nia afero, al la sekvantaj personoj:

al s-ro Gernet en Odeso	10,160 ekz.
al s-ro de Beaufront en Epernay	1,500 "
al la Klubo Esper. en Upsala	1,500 "
al d-ro Costa e Almeida en Rezende	500 "

Kune 13,660 ekz.

(Krom la montrita nombro da ekzempleroj, ricevitaĵ *senpage* por senpaga dissendado, la nomitaj personoj, precipe s-roj de Beaufront kaj Gernet, *acētis* ankoraŭ kelkan nombron da ekzempleroj por sia propra uzado aŭ por vendado).

Por ke la diritaj 13,660 ekz. povu esti kiel eble plej baldaŭ dissenditaj laŭ diversaj adresaj, estas bezonata kelka sumo da mono por poŝtaj elspezoj. Personoj, kiuj volas finance helpi al la dissendado, volu sendi siajn oferojn al s-ro V. Gernet en Odeso.

L. Zamenhof.

Pretaj manuskriptoj.

Mi sciigas la amikojn de nia afero, ke ĉe mi troviĝas kelkaj manuskriptoj, kiujn estus tre utile eldoni prese. La manuskriptoj estas jam tute pretaj, trarigarditaj, kaj la plej granda parto jam eĉ cenzuritaĵ (por presado en Rusujo), ĉar mi havis la intencon eldoni ilin je mia propra kalkulo. Sed mia nuna financa stato bedaŭrinde tion ĉi ne permesas al mi. Tial mi turnas min al niaj amikoj, ĉu iu el ili ne volus preni sur sin la eldonon de tiuj ĉi verkoj? La afero prezentas nenian riskon, ĉar pli aŭ malpli frue la enspezoj de la vendado kovros la elspezojn de la presado. La tuta malfacileco konsistas nur en tio, ke la eldonanto devos *atendi* kelke da jaroj, ĝis la vendado tute kovros liajn elspezojn de presado. La manuskriptoj estas: 1) plena lernolibro por poloj, kun antaŭparolo kaj 2 vortaroj (analogia al la rusa verko n:o 77); 2) plena lernolibro por portugaloj (analogia al n:o 77; tio ĉi devas anstataŭi la verkon n:o 57, kiu enhavas multajn erarojn); 3) lernolibro por angloj, kun 2 vortaroj (nova eldono de n:o 52, de kiu ĉiuj ekzempleroj perdiĝis); 4) plena lernolibro por hispanoj (anstataŭ la verko n:o 36, kiu tute ne povas esti uzata); 5) angla traduko de la "Ekzercaro" (n:o 72); 6) germana traduko de la "Ekzercaro". — Dezirantaj eldoni tiujn ĉi verkojn volu sin turni al L. Zamenhof en Grodno, Rusujo. Kompreneble, la manuskriptoj estos donitaj al la dezirantoj nur en tia okazo, se la aŭtoroj de la manuskriptoj nenion havos kontraŭ tio ĉi.

L. Zamenhof.

Folietono.

Skribante ree mian malmultepezan babiladon, mi ankoraŭ ne scias, kiel impresis la legantojn la folietono antaŭirinta. Sed ĉar nia gazeto fariĝas pli kaj pli interesanta, mi kuraĝas supozi, ke inter aliaj artikoloj la folietono ankaŭ trovos leganton kaj miaj bonaj celadoj de fidela servado al niaj amikoj iafaĵe estos ie bone akceptitaj... Oni diras, ke sur la flugiloj de aglo eĉ kolibro povas leviĝi tre alte, ĝis la suno; jen en tiu ĉi okazo mi volus esti tiu ĉi malgrandeta birdeto, ĉar kvankam mi ĉiam estos "malgranda", sed sur la flugiloj de nia lingvo mi povos akiri la spiriton de amataj amikoj de nia afero en diversaj landoj...

Kiam mi skribas tiun ĉi leteron, disvastiĝas la famo, ke la norvega vojaĝanto Frithiof Nansen atingis la nordan poluson... Bedaŭrinde liaj kunlandanoj ne tro diligente okupas sin je la lingvo internacia, ĉar ili havas nun la eblon plej precize sciigi la tutan mondon per helpo de nia gazeto, ĉu

tiu ĉi grava fakto efektive fariĝis, aŭ ĉu ĉiuj supozoj estas nur . . . belaj rakontoj. Vere, la naciaj gazetoj ankaŭ skribas pri tiu ĉi fakto, la humoristaj ĵurnaloj aldonas, ke Nansen, ekstarinte sur la poluso mem, trovis eĉ la veran akson de l' tero kaj ŝmiris ĝin per oleo, por ke la turniĝo de l' tero estu pli facila, — sed ĉiuj tiuj ĉi ĵurnaloj, ŝargitaj per la radioj de Röntgen, vidas sole la ostaron de la afero . . . La korpo de tiu ĉi ostaro perdiĝas en nebulo de konjektoj kaj supozoj.

Dume, malgraŭ la supozata ŝmirigo de l' tera akso per oleo, la printempo alvenis ĝustatempe, alvenos ankaŭ la somero kaj kun ĝi komenciĝos vojaĝoj kaj vojaĝetoj de niaj amikoj. Bonan vojaĝon kaj ankaŭ deziron de renkontado de plej multa nombro da amikoj de l' lingvo internacia! Unu bo-patro diris, ke estas pli bone edziĝi, ol ne edziĝi, ĉar al fraŭlo estas malbone ĉie, dum al edzo — sole en lia hejmo. Mi ne pensas, ke tiu ĉi profunda kaj iafoje justa diro estas la kaŭzo, kiu devigas la edzojn vojaĝi, sed kial nia afero ne povus profiti eĉ per tiu ĉi malpli aŭ pli multe rajta diro? Estas la fakto ke multaj el ni vojaĝos.

Jen estas la okazo ne sole renkontadi amikojn, sed ankaŭ propagandi nian lingvon inter ĉiuj, kiuj ne scias ankoraŭ, ke tiel utila kaj bona rimedo de interkompreniĝo ekzistas en la mondo, ke eĉ franco kun germano povas interparoladi libere pri paco kaj amikeco kaj ricevadi bonajn kaj klarajn respondojn. Ja super nia afero lumas ora stelo de tutmonda paco kaj kvankam la sveda ĵurnalo "Ned med vapnen" ne alkonformigis ankoraŭ nian lingvon por siaj altaj celoj, tamen la franca monata ĵurnalo de internacia konsento jam elpendis standardon de nia ideo, presante artikolojn en la lingvo . . . internacia. Tiu ĉi ĵurnalo estas nomata "L' Etranger", legata ĉie en la mondo. Kiu do el ni ne volos profiti el la favoro de tiu ĉi ĵurnalo, se tie eminentaj angloj, germanoj kaj aliaj nacioj presas multeindajn artikolojn pri paco kaj internacia konsento? . . . Pro la scivolo oni devas aboni "L' Etranger" (Paris, 77 rue Denfert-Rochereau), ĉar ni ne povas dubi, ke baldaŭ ni tie trovos artikolojn de portugaloj, bulgaroj aŭ armenoj, skribantaj en nia lingvo.

Mi persone tre volonte legus tiajn sciigojn, ĉar en naciaj ĵurnaloj ili ordinare ne estas originalaj, sed represitaj, ripetitaj kaj antaŭ ĉio ekkurbitaj en ĉiuj eblaj manieroj. Ĉar se la larĝaj manikoj de virinaj vestoj povas rapide ĉirkaŭkuri la mondon de Melbourne ĝis Gellivare, des pli devus disvastiĝi la pli larĝaj rigardoj kaj pensoj de kleraj homoj.

Unu mia konato kaj — hontinde — kunlandano mokis, ke nenia klera homo lernos la lingvon internacian, kaj mi respondis al li, ke li havas rajton, ĉar en tia okazo ni devas kalkuli inter kleraj homoj ne sole lin mem, sed eĉ papuanojn kaj irokezojn . . .

— Sed vi ja ne mallaŭdas telefonon? mi demandis.

— Kial mi povus riproĉi iel tiun ĉi utilan eltrovaĵon?

— Vi prezentu al vi, ke lingvo internacia estas ankaŭ eltrovaĵo, per kiu vi povas interparoli kun la homo, kiun vi neniam povas vidi kaj kiu krom la patra lingvo scias nur la internacian.

Li ekridetis, mi daŭrigis plu.

— Mia amata sinjoro, vi scias bone francan, germanan kaj rusan lingvon, kune tri lingvojn krom via patra.

— Jes, mi scias kvar lingvojn.

— Donu do al mi ian interesantan sciigon pri la urbo Rezende.

— Kie ĝi kuŝas?

— Vi ne scias? . . . Ĝi kuŝas en Portugalujo.

— Sed mi scias tie nenium.

— Prenu do de mi la vortareton de lingvo internacia kaj la adresaron de sciantoj ĝin.

Post unu momento li ŝanĝis sian opinion pri la lingvo internacia kaj post kvar semajnoj li alportis al mi la deziratan priskribon.

Se ĉiu agus tiel same kun renkontata mokanto, kiu scias, ĉu la nombro de niaj amikoj ne pligrandiĝus pli rapide?

Joz. Was.

Kanto al la flago de paco. *)

Flirtu, flirtu, flago de l' paceco,
Multaj venas nun al vi!
Al ni ne sin montras l' estonteco,
Sed je l' lum' konfidas ni.
Tial estu alte vi portata,
El la kor', amata, honorata,
Sonu nur pri vi la kant'
Varme el Brust' de l' amant'.

Ĉirkaŭantaj vin ni ĉiam diros
Koran vorton al la hom',
Kaj al amo reciproka tiros
En de l' paco sankta nom'.
Akraj malamec'-memoroj
Estu for el niaj koroj,
For batal' kaj batalil',
Flugu nigra sur flugil'.

Ho per sango vi ne makuliĝos!
Frata amo de l' homar'
Portas vin. Malamo estingiĝis
Kun la pensoj de barbar'.
Ne disigas vi kontraŭe,
Ligas fratojn vi ĉirkaŭe,
Firmas kredon je la ver',
Sanktan fidon en esper',

Supren, supren bela blanka flago,
Sankta sign', ni amas vin.
Supren, lumu kiel hela tago,
Gvidu en milito nin.
Batalantoj ne mankiĝos,
Ĉiam novaj elvekiĝos,
Ili kun espera kor'
Sekvos vin al venka glori'.

V. Langlet.

Skizoj gramatikaj.

2. Verbigo de substantivoj.

I.

Unu el la plej malfacilaj temoj de etimologio estas la vortfarado. La malfacileco devenas ne el tio ke la Esperanto estas ne fleksemebla. Malej La elementoj de nia lingvo montras grandan moviĝemon kaj interligemon ka! estas tiel mirinde interplektitaj kun la etimologio kaj la spirito de romanaj lingvoj, ke oni miras, vidante, ke per la malmulta nombro da esperantaj sufiksoj oni povas ricevi grandan aron da vortoj, tute identaj al la romanaj kaj al la logiko de ilia kunmetado — en la plej bela senco. La malfacileco estas en tio ke por fari novajn vortojn oni devas malŝpari grandan tempon por trari-

*) Por tiu ĉi versaĵo, apartenanta al la sveda poeto *J. M. Omberg*, estas antaŭnelonge verkita bela muziko de *Cl. Adelsköld*.

gardadi la leksikonojn de ne-artaj lingvoj kaj eltrovi la internaciajn leĝojn de vortfarado. La nun skribita artikolo estas provo de tia vortfarado; ĝi certe povas esti nek plena nek senerara, kaj tial mi petas niajn amikojn fari rimarkojn, plibonigojn, klarigojn je la pensoj, farantaj la enhavon de tiu ĉi artikolo: la kritiko estas la sola vojo veni al bona celo. Tiu ĉi artikolo estas dediĉita al verbigo de substantivoj, kiujn mi dividis en kelkajn klasojn. La unua klaso ampleksas la substantivojn, kiuj signifas *homo* aŭ *persono* (individua kaj kolektiva, efektiva kaj imaga).

Oni ricevas la verbon per almeto da la finiĝo *i* al la radiko. La verbo ricevas signifon: 1) plenumi la funkcion, la rolon, la agon de la ideo, enhavata de la radiko, 2) estadi en la stato, montrata de la radiko.

Fripono; friponi = agi fripone, friponmaniere, kiel fripono. Tion saman signifas la fr. verbo *friponner*, la angla *to cheat* (de la subst. *cheat* = fripono, trompisto), la rusa *мошеничат* (de *мошеник* = fripono); en la germ. lingvo la egalsignifo de tiu ĉi verbo mankas, kaj ekzistas nur sinonimoj (*Betrüger*, *betrügen*, *trompanto*, *trompi*), sed en ĝi estas la vortoj *Spitzbuberei*, *Schelmerei*, *friponado* (de substantivoj *Spitzbube*, *Schelm*, *fripono*).

Tajloro; tajlori = fari vestojn, efektivigadi la funkcion de tajloro; angle: *to tailor*; germane: *schneidern* (de *Schneider*, tajloro); ruse: *портняжит* (de *портной*, tajloro), en la franca leksikono mankas la responda verbo, oni diras: *exercer l' état*, la profession de tailleur, ekcerci aŭ plenumi la staton, la profesion de tajloro.

Patrolo; patroli; fr.: *patrouiller*; angle: *to patrol*; germ.: *patrouilliren*; ruse: *патрулироват*.

Advokato; advokati, avocasser, to advocat, advociren, advokatstvovat.

Piloto; piloti, piloter, to pilot (la germana vorto *Pilot* ne donas la respondon verbon *).

Profeto; profeti, prophétiser, to prophesy, prophezeien, proroĉestvovat (de *prorok*, profeto).

Ĉarlatano; ĉarlatani, charlataner, ruse: шарлатаничат; kvankam la angla kaj la germana leksikonoj havas tiun ĉi saman substantivon, ili tamen faras la verbojn ne de "ĉarlatano", sed de ĝiaj sinonimoj: *Quacksalbern* (de *Quacksalber*, ĉarlatano), *to mountebank* (de la subst. *mountebank*).

Monarĥo; monarĥi; angle: *to monarchiz*. La rusa verbo *carstvovat* (regi absolute) devenas de "car", sinonimo de monarĥo en la novtempa senco; tiu ĉi verbo mankas ankaŭ en la leksikonoj franca kaj germana; oni diras: *gouverner en monarchie*, als *Monarch beherrschen*, regi kiel monarĥo.

Laŭ tiu ĉi sama leĝo la substantivo *knabo* verbiĝas en la angla lingvo: *to boy* = esti knabo, agi kiel knabo. *Lakeo* verbiĝas: *to lakey*; fr.: *servir en laquais* = servi lakee; *majstro* en la lingvo germana donas la verbon *meistern* (kritiki, instrui kiel majstro, montri sin majstro), ruse: *masterit* = majstri. La substantivo "sklavo" havas la respondan verbon ŝajne nur en la angla lingvo: *to slave*; la francoj diras multvorte: *travailler comme un esclave*, laboradi kiel sklavo, la germanoj diras sinonime: *sich abarbeiten*, sin konsumadi per laborado (de *Arbeit*, laboro). La subst. "najbaro" havas la respondan verbon en angla (*to neighbour*), en franca (*avoisiner*, de *voisin*, najbaro), la rusa verbo *soseditsia* signifas najbariĝi, fariĝi najbaro. "Vikario" havas la verbon nur en la franca l.

*) Per tio ĉi mi tute ne tuŝas la demandon, ĉu verboj devenas el substantivoj ĉu male. Tiu ĉi demando estas por la nuna celo tute senutila.

(vicarier, fari la fonkciojn de vikario), la angloj, germanoj kaj rusoj esprimas tion ĉi multvorte. *Princi* = *to prince* = *faire le prince* = *fürstlich leben* = vivi kiel princo. La angla subst. *lord* (lordo, sinjoro, edzo, Dio) donas la verbon *to lord*, regi, sinjori, agi kruele, tirani. *Arlekeni* = *to arlequine* = *faire des tours d' arlequin*, den Arlekin machen. *Spioni* = ruse: *şpioniĉat*, angl.: *to spy*, fr.: *espionner*, germ.: *spioniren*.

Kiel oni vidas, ne ĉiuj substantivoj de la nun esplorata klaso povas verbiĝi en la ne-artaj lingvoj. Tamen la supremontritaj ekzemploj, kiujn oni povus tre facile multnombri, pravas la *tendencon* de substativoj al verbiĝado. Tion ĉi pravas ankaŭ la ekzisto de vortoj, kiuj esprimas staton de personoj, iliajn ecojn, profesiojn, ekzemple: *chevalerie* = *knighthood* = *Ritterschaft* (kavalireco, kavalira ordeno, kavalira stato aŭ rango), *brotherhood* = *fraternité* (intima ligo inter homoj, frateco, rilato de frato al frato), *enfance* = *childhood* = *kindheit* (infaneco, infanstat) k. t. p. Estus tre strange, se oni povus esti en stato de kavaliro sen povi kavaliro (agi kavaliro, kiel kavaliro), se oni povus esti kapitano sen kapitani. Tiaj okazoj eble havas lokon en la mondo (kio ne okazas en ĝi?), sed similaj faktoj estas nur esceptoj.

Krom tio ĉi, kvankam multe da vortoj de ne-artaj lingvoj tre bone verbiĝas, la verboj venantaj el ili ofte havas kelkajn sencojn anstataŭ unu; ekz.: *to lord*, regi, tirani; *lakejniĉat* (lakej) havas unue la rektan sencon (esti lakeo) kaj due — pli ofte — signifas “ludi malestiman rolon”. Sed tiu ĉi cirkonstanco ne povas esti malhelpo. La praktiko baldaŭ montros ke tiu ĉi multsignifo ne donas konfuzon, kaj la plena frazo ĉiam povas precize montri la necesan sencon.

La tria trajto de la pridirata klaso da vortoj konsistas en tio ke en la lingvoj ne-artaj la verbigita vorto iam tute ne signifas fari la fonkciojn de la radika substantivo, sed havas nur apudan signifon; ekzemple: la rusa verbo *besitsja* (de *bes* = diablo) signifas esti kolerega, furioza kiel diablo; la franca subst. *cousin* donas la verbon *cousiner*, kiu signifas: nomi iun kuzo; tiel ankaŭ la rusa verbo *sestritsja* (de sestra, fratino) signifas internomi sin fratino kaj vivi kiel fratinoj; la franca subst. *recrue* (rekruto) donas la verbon *recruter*, *to recruit*, *rekrutiren*, kiu signifas *varbi* rekrutojn (kiel ankaŭ la agantaj substantivoj *recrutement*, *recruitment*, *Rekrutirung* havas la sencon: varbado de rekrutoj).

Se la dua trajto de niaj substantivoj tute ne povas nin konfuzi (ĉar se ni diros ekzemple: “proletariante oni ne povas princo”, ĉiu komprenas ke la vorto “princo” tie ĉi ne signifas fari princajn fonkciojn, sed nur — ludi la rolon de princo, vivi kiel princo), la tria trajto tamen donas lokon al embaraso. Feliĉe la nombro de tiaj vortoj estas tre malgranda kaj tial estas tre facile eviti la uzon de ili. Mi persone pensas ke estas pli bone uzi ilin en la logika senco ol en la senco kutima, t. e. meti: *fratini* = esti fratino, rilati sin al aliaj kiel fratino, fari la rolon de fratino, *rekruti* = esti rekruto k. t. p.

Tial kun helpo de Dio ni vortfaradu: *abati*, *angeli*, *arlekeni*, *avi*, *barbiri*, *bubi*, *burgi*, *ĉambelani*, *ĉefi*, *dandi*, *demoni*, *dii*, *diabli*, *duonpatrini* (esti duonpatrino, agi kruele rilate infanojn, agi kiel duonpatrino), *estri* (ŝipestri, regimentestri, imperiestri k. t. p.), *fianĉi*, *farmasoni*, *gasti*, *heroi*, *infani*, *kurieri*, *leŭtenanti*, *majstri*, *notarii*, *oficiri*, *pioniri*, *sinjori*, *soldati*, *vasali* k. t. p. k. t. p. *Ekzemploj*: Kion vi profesias? Mi tajloras. Regimentestri estas pli malfacile ol oficiri. Sinjoro, vi malsaĝas, vi infanas. Li majstras, mi submajstras. Demonado ne estas malproksima de diablado, kaj arlekinado de friponado.

Oni povas patri infanojn, ne estante ilia patro, kaj duonpatrini ilia, estante ilia sang-parenca patrino. Vi parolas al mi per tia tono, kvazaŭ vi sinjoras kaj mi vasalas. Fratado aŭ kunfratado estas stato aŭ ago, en kiu homoj elaperigas fratajn sentojn aŭ rilatojn; ĉian membron de frataro aŭ kunfrataro la germano nomas "confráter" (pruntito el la lat. l.), kio signifas kunfratano.

La pasiva participo de tiuj ĉi vortoj tre klare montras ke la proponata formo de verboj estas tute propra al la romanaj lingvoj. Scie la verboj *episkopi*, *konsuli*, *vikarii* k. t. p. donas la tute internaciajn substantivojn: *episkopato*, *konsulato*, *vikariato*, *bakalaŭrato*, *kalifato*, *majorato*, *markizato*, *proletariato*, *notariato*, *patronato*, *pontifikato*, *protektorato*, *rektorato*, *sindikato* kaj la verbajn adjektivajn: *episkopata*, *vikariata* k. t. p. Bedaŭrinde ne ĉiuj nacioj donas al tiuj ĉi vortoj la samajn sencojn. Unuj nacioj donas al tiu aŭ ĉi tiu vorto 3—4 sencojn, aliaj nur unu aŭ du. Laŭ la Esperanta senco la vorto *episkopato* devas signifi "io, super kiu plenumiĝas la funkcioj de episkopo", la franca leksikono donas tri signifojn: rango de episkopo, stato de episkopo kaj la tempo, daŭre kiu la episkopo plenumas sian oficon. Al la vorto *sindikato*, la germanoj ekster tio ĉi ŝajne ankaŭ aldonas la signifon de loĝejo de sindikato. La vorto *notariato* signifas sole ofico de notarioj. Sed tia cirkonstanco ne povas esti tre konfuzanta. La senco de la frazo ĉiam bone montras, kion volas diri la skribanto. Se "sindikato" povas iafaje signifi "loko, kie la sindikoj kunvenas", la vorto "notariato" ne povas tiel senci laŭ sia naturo, ĉar notarioj ja neniam kunvenas kiel ankaŭ proletarioj, kaj sekve tiaj vortoj kiel notariato, proletariato, majorato, patronato povas montri nek daŭron de ilia stato, nek lokon, kien ili kunvenas, ĉar ili ne havas difinan lokon de kunveno aŭ loĝejon kaj entute povas daŭri ĉiam.

Tamen ŝajnas ke kelkaj vortoj de la esplorata klaso ne kapablas verbiĝi, ekzemple: *homo*, *negro*, *kreolo*, *zambo*, *metiso* k. t. p. En tia okazo, se ili ne povas verbiĝi, ni ilin ne verbigu, ĉar estas klare ke ili ne transformiĝas en verboj nur tial ke ilia verbiĝo donas nenian utilon. Tamen la vorto *aziano* (de Azio) povas ŝajne formi verbon "*aziani*", esti malklera, kruela, fanatika.

Ĝis nun mi parolis nur pri tiaj substantivoj, signifantaj homo aŭ persono, kiuj estas kunmetitaj de radiko + la simpla substantiva sufikso *o*. Sed entute ni povas havi 4 formojn de verboj: 1) unu simplan formon, ekz.: dandi, kaj tri kunmetitajn, 2) muzik-ant-i, 3) muzik-ist-i, 4) muzik-ul-i. La nuancoj inter tiuj ĉi 3 lastaj formoj ne estas facile malsekretigeblaj. Kiam nia literaturo plene disfloriĝos, instruituloj kaj literaturistoj substrekos ĉiajn ĝiajn ecojn. Mi volas nur atentigi la legantojn je tiuj ĉi formoj. Eble ne ŝajnos erara, se mi diros ke "muziki" signifas simple — kombini sonojn per maniero agraba por orelo, kaj "muzikisti" — instrui, doni lecionojn de muziko, esti specialisto de muziko, fari muzikan profesion (ekz.: se oni demandas muzikiston, kion li profesias, li ne povas respondi: mi muzikas, sed nur: mi muzikistas).

Apud tiuj ĉi verbaj formoj ekzistas ankaŭ aliaj: *abatigi* (fariĝi abato), *patriĝi*, kaj — *abatigi*, *oficirigi*. Sed dume "abati" esprimas staton de abato, plenumadon de abataj funkcioj, la sufikso *iĝ* montras la transformon en alia stato aŭ ŝanĝon, *ĝi* montras ke iu, kiu ĝis difina tempa limo havis unu rolon — ekzemple ne-abatan — transiras en alian staton, plenumas alian oficon aŭ rolon.

Restas unu demando: kiel estas pli bone diri: *sinjorigi*, *oficirigi*, *amikigi* (en senco — fari *el* ia homo sinjoron, oficiron, amikon), aŭ: *sinjorantigi*,

ofcirantigi, amikantigi? Mi faras tiun ĉi demandon pro tio ke la francoj eble emos traduki "sinjorigi, amikigi" per "fari sinjoron, fari amikon ne *el* ia homo", t. e. ne transfari homon en sinjoron, amikon, sed tute simple — kiel ili diras "faire des enfants". Sed ankaŭ tie ĉi, mi pensas, la frazo ĉiam povas montri la veran signifon de la vorto. Ekz. se ni diros: "Fine la sorto ekridetis al li, oni lin oficirigis; la maljuneco infanigis lin" k. t. p., ni tute klare komprenas, ke la verboj havas unu kaj tute precizan signifon.

A. Kofman.

Amo.

El pola poeto Kazimierz Tetmajer.

Ŝajnis al mi, ke mi vidis ĉiujn horojn, kiujn mi havas ankoraŭ transvivi, flugantajn malrapide antaŭ miaj okuloj, kiel amaso da laroj *) en la momento de foriro de l' suno, kiam la tago estas varmega . . .

Komence la blankaj flugiloj de ĉiuj horoj de mia vivo estis makulitaj per sango, per mia propra sango; sole unu, la lasta, havis flugilojn blankajn kaj purajn.

Tiam mi ekpensis, ke mi havos almenaŭ la morton dolĉan kaj trankvilan . . .

Jen subite alvenis ŝi, tiu ĉi virino, kiun mi amas, kaj ekvidinte horojn, kiujn mi havas ankoraŭ transvivi, ke ili estis ĉiuj sangitaj kaj nur la lasta estis blanka kaj pura, — ŝi diris:

— Mi volas, ke tiu ĉi estu ankaŭ tia, kiel la aliaj.

Mi ne demandis ŝin: kial?

Kaj poste ŝi diris:

— Sed el kie preni la sangon? . . .

Tiam mi montris al ŝi mian koron kaj donante al ŝi ponardon, mi diris:

— Ekbatu!

Kiam ŝi levis la manon por ekbati, mi pensis nur, ĉu mi scios sufoki ĝemon por ne ektimegigi ŝin, kaj kiam ŝi ekbatis, kvankam la doloro estis freneza, mi ne ekĝemis.

La sango, kiu elŝprucis el mia koro, ekmakulis la flugilojn de la lasta horo de mia vivo, flugilojn blankajn kaj purajn. Tiam mi ekpensis, ke mi havos ankoraŭ eĉ morton maldolĉan kaj teruran, sed mi ne demandis, kial tiu ĉi virino tiel faris al mi.

Ŝi volis tiel — kaj mi amas ŝin . . .

Trad. J. W.

Bagateloj.

Alesto de konscio. Scieneulo okazigis unufoje en tia dispensemeco trinki grandan glutajon da inko el sia inkujo. Feliĉe li havis tamen sufiĉe da konscio por tuj engluti da foliojn da inksorbilo.

Konfido. "Avino, ĉu vi havas fortajn dentojn?"

"Ne, mia malgranda amiko, bedaŭrinde mi ne havas eĉ unu denton."

Estas bone. Volu do kaŝi miajn nuksojn, ĝis mi revenos."

P. N—n.

*) *Larus*, lat.

Kiel propagandi nian lingvon?

Laborante por nia lingvo ni devas antaŭ ĉio celi kiel eble pli rapide kaj pli multe pligrandigi la nombron de niaj partianoj. Tio ĉi estas pli grava kaj pli bezona ol ĉio, ĉar tio ĉi povas doni al ni unue — novajn freŝajn laborajn fortojn, kaj due — necesajn materialajn rimedojn. Por multoblige la adeptojn de nia lingvo antaŭ ĉio kaj pli ol ĉio estas bezone pli aŭ malpli detale konatigi kun internacia lingvo kiel eble pli grandan nombron da personoj, kapablaj interesiĝi je ĝi. Mi opinias, ke tre efika, malkara, oportuna kaj simpla rimedo por tio ĉi estas publikado pri internacia lingvo, sed publikado vasta, detala, ne tia nudavorta publikado, kiu estis praktikata ĝis nun de niaj amikoj en diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Publikado en la formo de mallongaj anoncoj*), kiuj sciigas nur pri la ekzistado de l' lingvo internacia, ne atingas la celon. Tiuj ĉi anoncoj, ofte aperante en gazetoj, povas nur tedi al la legantoj, sed ne interesi ilin, des pli, ke en la societo estas tre vastigita la antaŭjuĝo kontraŭ la ideo de l' lingvo internacia. La societanoj rigardas la ideon de lingvo internacia kiel utopion, pri ĉiuj provoj de artaj lingvoj kaj pri Esperanto mem ili havas tre nekularan, ofte eĉ monstran prezenton kaj opinias, ke ĉiu provo de tiu ĉi speco estas nedubebla sensecaĵo. Tial, propagandante nian lingvon, ni devas antaŭ ĉio peni por distri tiun ĉi antaŭjuĝon de la societo kontraŭ nia lingvo kaj montri al la societanoj nian lingvon en ĝia efektiva formo. Tia propagando estus tre efika. Mi kuraĝe diras tion ĉi laŭ la propra sperto.

Kiam mi konatigis kun Esperanto kaj estis ravita de ĝi, mi en atako de entuziasmo skribis multe da leteroj pri internacia lingvo al miaj konatoj, konvinkante ilin okupi sin per la ellernado de tiu ĉi lingvo. Miaj leteroj, kiel mi mem sentis kaj kiel poste parolis miaj konatoj, estis skribitaj varmege kaj konvinke, kiel oni povas skribi nur ĉe la influo de la unua plej forta impreso. Kompreneble mi ne dubis, ke miaj leteroj havas grandan sukceson. La letero de konata kredinda homo kaj eĉ amiko ne estas ja gazeta anonco, en kiu oni povas skribi ĉion. Kaj tamen miaj leteroj havis preskaŭ nenan sukceson. Tiam mi ŝanĝis la taktikon. Mi venigis kelkajn ekzemplerojn de la verko n-o 77 kaj dissendis la libretojn al miaj konatoj por konatigi ilin kun la lingvo internacia. Kia do estis la rezultato? Tiuj samaj miaj konatoj, por kiuj miaj leteroj estis tute neefikaj, ricevinte la dissenditajn de mi libretojn, ĉiuj komencis diligente lerni la lingvon internacian, fariĝis ĝiaj varmegaj adeptoj, kaj de ili mi jam ricevis kaj ankoraŭ ricevas leterojn kun danko por tio, ke mi konatigis ilin kun la lingvo internacia. Multajn fojojn mi demandadis tiujn ĉi miajn konatojn: "kial vi ne plenumis mian konsilon pli frue, kiam vi ricevis mian leteron? Kial vi tiam ne mendis la librojn, kiujn mi konsilis al vi mendi, kaj ne okupis vin je la lingvo Esperanto?" Miaj konatoj ordinare respondadis al mi proksimume la sekvantan: "mi meniam kaj al neniu povis kredi, ke povas ekzisti tia facile ellernebla kaj kune tia ĉiufanke bonega lingvo, kiel Esperanto; tio ĉi ŝajnis al mi nekredebla, neebla, eĉ nepensebla; mi eĉ ne povis prezenti al mi ion similan". Jen kiel efikas la ecoj

*) Mi ne parolas tie ĉi pri la artikoloj, tuŝantaj nian lingvon, kiuj aperadis en gazetoj kaj ĵurnaloj, ĉar tiuj ĉi artikoloj aperadis tre malofte kaj estis ordinare tre mallongaj kaj fragmentaj.

de nia lingvo je homoj, kiuj pli-malpli proksime konatiĝas kun ĝi kaj estas kapablaj interesiĝi je bona afero. Tiun ĉi manieron propagandi nian lingvon mi proponas al niaj amikoj. Estus tre bone eldoni, post la antaŭa abonado, la verkon n-o 77 aŭ ian similan en granda nombro da ekzempleroj, ekz. 5,000, kaj eble pli malkare, por ke ĉiu ekzemplero kostu ne pli ol 5 kopekojn. La esperantistoj abonus po kelke da ekzempleroj de tiu ĉi verko kaj dissendus ilin al tiuj el siaj konatoj, kiuj estas kapablaj interesiĝi je nia afero. La elspezo, necesa por tiu ĉi entrepreno, estus tre malgranda ofero de niaj amikoj, sed por nia afero tio ĉi estus tre utila, multe pli utila, ol la presado de l' nudavortaj anoncoj en la gazetoj, eĉ se tiu ĉi presado estus farata en la plej granda mezuro.

Krom tio estus tre bone eldoni apartan anoncon, ekz. sur 4 paĝoj de ordinara formato en la kvanto de 100 miloj da ekzempleroj. En tiu ĉi anonco devas esti presita per malgrandaj literoj la tuta gramatiko de la lingvo Esperanto, modeloj de l' esperanta parolo en versoj kaj en prozo, eltiró el la vortaro, necesa por traduki tiujn ĉi modelojn, kelkaj vortoj pri historio, celo kaj pri la nuna situacio de nia lingvo, unuvorte oni devas mallonge kaj klare pri-skribi la esencon de l' lingvo internacia, por ke ĉiu, traleginte tiun anoncon, povu akiri la klaran kaj definitan ideon pri la lingvo. Ĉiujn ekzemplerojn de la anonco oni devus dissendi al la redakcioj de la plej bonaj gazetoj kaj ĵurnaloj kaj peti pri la senpaga dissendo de la anonco al iliaj abonantoj kune kun iliaj eldonoj. Per tia maniero ni altirus al nia afero preskaŭ la tutan inteligentularon de la lando, preskaŭ ĉiujn homojn, kiuj legas, pensas kaj estas kapablaj fordoniĝi al bona afero. Tiu ĉi publikado kostus 200—300 rublojn. Se ni supozos, ke el 100 da anoncoj nur unu efikos, ni akiros jam milon da novaj anoj, kaj tio estas por ni tre grava akiro.

Tria maniero de propagando estas ankoraŭ pli simpla kaj tute malkara, sed kredeble la plej efika. Ni devas havi en eble pli multaj urboj apartajn agentojn por la propagando de l' lingvo internacia. Ĉiu agento havos malgrandan provizon da esperantaj lernolibroj kaj aliaj libroj en nia lingvo. Li havos ankaŭ kelkajn ekzemplerojn da aparta anonco kaj surglutos ilin en ĉiuj pli vivaj lokoj de sia urbo. En la anonco estos dirita, ke la agento de l' esperanta societo (lia nomo kaj adreso) petas ĉiujn, kiuj deziras ellerni la lingvon internacian, sin turni al li, en definitaj horoj de l' tago por ĉiuj informoj kaj klarigoj, tuŝantaj la ellernadon, ke li vendas kaj donas por legado kaj trarigardado esperantajn librojn, ke li instruas senpage la lingvon Esperanto k. t. p. Krom tio la agento zorgos, ke ĉiu publika legejo de la urbo ĉiam havu sur sia tablo por trarigardo po unu ekz. da pli gravaj libroj en Esperanto kaj da esperanta gazeto. Li zorgos ankaŭ pri la plej baldaŭa formigo de la loka esperantista rondeto en la urbo. Speciale li penos konatiĝi kun la lernanta junularo de l' urbo, ĉar la junularo estas pli kapabla al forlogoj kaj povas alporti al nia afero pli multe da utilo, des pli la junularo klera.


Jen estas tri simplaj, malkaraj kaj oportunaj rimedoj, kiuj povas esti utilaj al nia afero kaj, kiel mi kredas, povas multoble pligrandigi ĝian sukceson. Kaj ĉion tion ĉi ni povas plenumi per komunaj fortoj tre facile: oni bezonas nur laboremecon kaj amon al nia sankta afero.

M. S. Rakitski.

— La proponataj de s-ro Rakitski rimedoj estas senduble tre utilaj. Bedaŭrinde la unuaj du rimedoj postulas sufiĉe grandajn elspezojn kaj estas

neplenumebĵaj en la nuna tempo. La tria maniero estas tre bona kaj ni petas la personojn, kiuj deziras esti agentoj, skribi al ni pri tio, por ke ni povu laŭ la eblo helpadi al ilia agado.

Red.



La Sanktejo de l' Scio.

El lingvo sveda tradukis *P. Nylén.*

Sur senfina ebenaĵo, norde limigita de alta monto, aperis juna viro, rapide migranta antaŭen en la unuaj radioj de l' matena suno.

El la arbetaĵoj, kiuj staris surŝutitaj per neĝfalo de blankaj floroj, el la arboj, sur kies branĉoj tremadis la unuaj delikataj folioj, alvenis al liodoro de floroj kaj kantado de birdoj.

Sed la juna viro estis indiferenta al la beleco de l' tero kaj rapidigis sian iron, firme direktante ĉiam la rigardon al la celo antaŭ li.

Iam post iam li murmuris: "Ne, mi ne trompas min; tie supre estas la sanktejo de l' scio".

Li iris antaŭen tra vilaĝoj, kie la vilaĝanoj vivadis sian simplan vivon; li iris tra popolriĉaj urboj en la tempo, kiam la laboristo rekomencas sian bataladon pro la pano, sed li nenie restis.

Li migris antaŭen inter homaj loĝejoj, kie loĝas nekonataj estaĵoj, li iris antaŭen sen permesi haltigi sin de la alvokantaj malfeliĉuloj. Li ne retenis sian rigardon ĉe la ĝojo de la homoj pli, ol ĉe iliaj malĝojoj, kaj liaj lipoj ripetadis: "Supren, supren!"

Kiam li venis trans la vasta ebenaĵo, la monto, kontraŭ kiun li estis migranta, leviĝis alta kaj superpotenca antaŭ li, kaj ĝia supro malaperis en malluma nubo.

En tiu momento lia vojo estis krucata de maljunulo, kiu tiregis al sia pajlo-tegmenta dometo faskon da hejtajo, tro multepezan por lia klinita dorso. La maljunulo apogis sin al ŝtona muro por repreni la spiron kaj lia frunto, malseka pro ŝvito, rakontis pri longa vivo da ĉagrenoj.

Li tre dezirus komenci interparolon kun la migranto, sed tiu ne respondis lian humilan saluton. Li eĉ ne rimarkis lin. Lia rigardo estis direktita al la altaĵo.

Kaj li ĉiam ripetadis: "Supren, supren!"

Kiam li atingis la piedon de l' monto, li ekhaltis por ĉirkaŭrigardi. Intencante ekdaŭrigi sian migradon, li ekvidis fonton, kiu elfluadis inter du ŝtonegoj. Juna knabino staris apude, atendante ĝis ŝia poto pleniĝos. Ŝi mallalte kantis, kaj ŝia klara voĉo miksiĝis kun la boletado de l' akvo. Li petis trinkaĵon. La bela knabino transdonis al li la poton per siaj blankaj manoj. Dum li trinkis, ŝi diris: "Ripozu ĉe mi. Mi por vi kantos".

Sed li ekleviĝis, severe dirante: "Mi iras al la sanktejo de l' scio, supren, supren!" Kaj li rekomencis la malfacilan suprenpaŝadon. Jaroj pasadis, kaj ju pli li iris supren, des pli la monto fariĝis nuda. Ĝi nun estis surŝutita per disaj ŝtonoj, kiuj ruliĝis kontraŭ la ŝtonegoj.

Poste sekvis la glacio, la neĝo eterna, la mortiganta nebulo . . .

Sed la migranto estis persistanta. Li maljuniĝis, kaj li sentis, ke la vivo kun ĝia celo baldaŭ forkuros de li. Liaj manoj kaj genuoj sangis, li

tremis pro malvarmo, li apenaŭ povis spiri en la aero maldensa. La suno estis baldaŭ subironta, sed li ĉiam ripetadis: "Supren, supren!"

Fine do li estis supre. Tute malgranda plato formis la supron de la monto. Dum li ĉinflanken rigardis, serĉante la sanktejon de l' scio, tiun sanktejon brilantan, kiun ĉe l' ekstrema horizonto li tiel ofte rigardis de malsupre, tiam viro kun longaj blankaj haroj duone sin levis de ŝtonego, sur kiu li kuŝadis, dirante per senŝonora voĉo al la migranto:

"Malsaĝulo! Vi, kiel mi, volis atingi la sanktejon de l' scio. Ne ekzistas io tiela, aŭ, pli ĝuste, ekzistas tielaj sennombraj, kaj vi preteriris ilin. La sanktejoj de l' scio estas malsupre, sur la ebenajo, kiun vi forlasis. Ĝi estas la loĝejo de l' homoj."

Sed la migranto ne estis konvinkita.

"Kaj la senco de l' vivo?" li demandis.

"Ĝi enhaviĝas en la vivo", respondis la maljunulo. "Amu kaj suferu, kaj vi lernos ekkoni ĝin."

"Kaj Dio?"

"Li troviĝas tie malsupre en la amaso, ĉie, kie brilas la fajrero de la bono kaj flamas la sankta flamo de la memrifuziĝo. Returniĝu tien, de kie vi venis, se ankoraŭ por tio estas tempo. Mi estas tro maljuna. Mi restadas tie ĉi por averti viajn fratojn."

Kaj sufokante ĝemon, la migranto kun mallevita kapo komencis depaŝi la monton. Ĉe ĝia piedo li denove renkontis la junan knabinon, ĉiam egale sanan, ridetantan. Sed dum ŝi konservadis sian junecon, li perdis la sian, kaj ŝi ne petis lin aŭskulti ŝian kantadon.


Nur la maljunulo, kun la dorso kurbita sub la portajo, rimarkis la migranton kaj ree salutis lin.

Tiun ĉi fojon li ekhaltis.

"Aŭdu, — li diris, — mi helpos vin".

Kaj li deprenis la multepezan portajon de la dorso de l' maljunulo.

En la sama momento, kiam li levis ĝin, malfermiĝis liaj okuloj. Li ekkomprenis la sencon de l' vivo, ekkonis la scion kaj ekstrevis Dion.



Monahino.

Skizo de A. Prohoroviĉ-Koĉmarengo.

En trankvila monaĥeja tombejo, kiu kuŝis sur bordo de malgranda lago, en unu bela somera tagmezo sidis juna beleta monaĥino. Ŝi profunde enpenŝiĝis; antaŭ ŝiaj grandaj malgajaj okuloj staras alia lago, tie, en ŝia parenca vilaĝo. Sur tiu lago, en belega suda nokto, ŝi ekaŭdis unu fojon vortojn de amo, donis unuan kison... Kaj multajn tiajn feliĉajn scenojn rigardadis la arĝenta lago kaj la maljunaj revaj salikoj. Rememoras ŝi ankaŭ malgajan tagon de disiĝo, tian teruran tagon, en kiu ŝi diris al li "adiaŭ!" por ĉiam... Ili ambaŭ estis neriĉaj kaj lia patro, por plibonigi siajn financajn aferojn, ordonis al filo edziĝi je riĉega konata fraŭlino. Li ne volis, li kontraŭparolis, petegis, sed nenio helpis kaj eĉ ŝi mem, kaŝante en la koro suferon, admonis lin sekvi la konsilon de l' patro. Kaj li obeis...

Post kelka tempo, kiam ŝia patro mortis, ŝi restis tute sola en la mondo.

Vere, ŝi havis malgrandan filinon, sed kun malvarma teruro ŝi pensis, ke, kiam tiu ĉi filino fariĝos grandaĝa, ŝi povas kun malestimo kaj abomeno deturni sin de la patrino. Ne, ne, pli bone, ke la knabino neniam konu sian patrinon, pli bone ŝi supozu, ke ŝi estas orfino. Kaj jen ŝi metis infanon al unu bonkora maljuna vidvino kaj mem foriris tien ĉi, en malgrandan modestan monaĥejon.

Tri jaroj pasis nerimarkite, trankvile, kiel dormo sen sonĝoj... Nur hodiaŭ ŝi kvazaŭ vekigis; ia sopiro, ia nekomprenebla ekscito ĉirkaŭkaptis ŝin kaj kvazaŭ ia nevidebla forto igis ŝin veni tien ĉi, en trankvilan monaĥejan tombejon... Kaj jen ŝi sidas, tiel profunde enpensiginte, ke eĉ ne rimarkas, ke la tagmeza julia suno haltigis super ŝia kapo kaj surverŝas ŝin per sia blindiganta lumo kaj neelportebla varmego...

— Bonan tagon, fratino! — ekaŭdis ŝi subite junan viran voĉon.

La monaĥino ekstremis kaj timeme ekrigardis. Kio estas ĝi? Sonĝo? Fantomo? aŭ efektive antaŭ ŝiaj okuloj staras tiu sama homo, pri kiu ŝi jus pensis?... Jes, efektive li! Tiu sama altkreska figuro, tiu sama nebela, sed bona simpatia vizaĝo, oraj bukloj de haroj, saĝa alta frunto, bonaj brunaj okuloj... Jes, jes, efektive li! Kun teruro, per larĝe malfermitaj okuloj rigardas lin la monaĥino kaj en ŝia kapo turmente kuradas la penso: "ĉu li ekkonis min?"

— Vi permesas al mi sidiĝi? — ĝentile demandis la sinjoro.

La monaĥino jesigis silente, ne havante forton rifuzi, nek foriri, kaj nur en tiu ĉi momento ŝi rimarkis, ke li tenis la maneton de malgranda bela knabino, kiu tre volonte sidiĝis sur la genuojn de la monaĥino.

Iom post iom komenciĝis interparolo kaj li nevole rakontis al tiu ĉi ĉarma simpatia monaĥino pri lia malĝoja vivo. Ne, li ne estis feliĉa kun lia riĉega edzino, kiel supozis ŝi tiam, kiam admonis lin edziĝi pro mono, kontraŭe, li estis multe malfeliĉa. Lia sola konsolo estis tiu ĉi knabino, filino de lia amata Anno, kiu sciigis lin pri la naskiĝo de l' infano kaj pri ĝia adreso, sed ŝi mem perdiĝis sen postsignoj.

La monaĥino ree ekstremis kaj paliĝis. Sekve tiu ĉi ĉarma knabineto, kiu tiel dolĉe dormetas nun sur ŝiaj brakoj, estas ŝia filino? Ho, kia turmento — teni sian infanon kaj ne havi rajton diri: "mi estas via patrino". Kia turmento — rigardi amatan homon, kiu iam estis tia proksima, amanta, kaj nun eĉ ne rekonis ŝin, kaj ne povi diri al li: "mi estas via edzino".

Kaj li daŭrigas sian malĝajan rakonton. Lia edzino estis malbona, senkora, kaprica virino, aroganta, fiera. Ŝi povis okupadi sin nur per ornamoj, baloj, vizitoj. Al la edzo ŝi rilatis kiel al necesa apartenaĵo en ŝia riĉa luksa domo, li ne estis por ŝi edzo, ne estis eĉ simple homo. Kaj tia terura por li vivo daŭris dum kvar jaroj, post kio la edzino malsaniĝis kaj mortis.

— Kaj de tiu momento en mia kapo estas nur unu penso — trovi mian amatan Anjon, patrinon de mia kara filino. Mi serĉadis jam, sed vane. Ĉu mi trovos ŝin, ĉu ekvidos? — tiel ~~ŝi~~ li sian rakonton.

La monaĥino rapide sin levis... Ankeriĝis unu momento, kaj ŝi ne eltenus. ekkrius al li; "ja mi estas via Anjo, kiun vi tiel pasie serĉas!"

— Mi devas iri al nia abatino, pardonu, — diris ŝi, penante esti trankvila: — jam estas malfrue.

— Efektive? Ni ankaŭ devas veturi stacion, ja ni venis vian monaĥejon veturante preter ĝi. Nun mi ree veturas serĉadi mian Anjon.

— Pli bone ne serĉu: eble renkonto kun ŝi alportas al vi ambaŭ ankoraŭ pli grandan malĝojon, — mallaŭte diris la monaĥino, — Adiaŭ, feliĉan vojon!

Atendu, infano, prenu jen tiun ĉi rozarion, portadu ĝin ĉiam sur la kolo, ne perdu. Nu iru, iru, adiaŭ!

Ili foriris... Kun malespero en animo rigardas post ilin la pala monaĥino: en la dua fojo ŝi perdas sian feliĉon, sed tiam ŝi memvole forpuŝis ĝin, kaj nun la severa devo postulas de ŝi tian agon.

— Adiaŭ, karaj, adiaŭ!... — murmuras ŝi per palaj lipoj, irante al ŝia modesta ĉambreto.

— “Kiel li povis ne rekoni min?” — pensas ŝi, kuŝante sur lito. — “Pli ol unu horon ni sidis kune, eĉ mia vizaĝo ekŝajnis al li iom konata, sed li ne konjektis... Tamen li ankoraŭ amas min, serĉas... Kion li dirus, se li eksciis ke lia Anno estas monaĥino? Malfacile estus al li... Malfeliĉa, kia malgaja estis lia vivo... mi estas kulpa... mi forlasis lin, forlasis malgrandetan filinon... Ha, sed ankoraŭ ja estas eble plibonigi mian eraron, ankoraŭ ne estas malfrue, eble ili ankoraŭ ne forveturis... Kuri al ili, diri al li: “mi estas via Anjo” ekkapti kaj alpremi al la brusto sian filinon... Forveturi kun ili malproksimen... malproksimen kaj tie ekvivi per trankvila, feliĉa vivo... Jes, kuri, pli rapide... pli rapide...”

Ŝi rapide eksaltis de lito kaj alkuris al la pordo, sed en tiu ĉi momento ŝia rigardo falis sur ŝian monaĥinan veston, kies severa vido memorigis al ŝi pri tiuj promesoj kaj rifuzoj, kiujn ŝi donis antaŭ la altaro, memorigis, ke ŝi estas nelibera, ke la monda feliĉo ne ekzistas por ŝi, ĉar ŝi mem, laŭ la propra volo, rifuzis ĝin.

— Ho, Dio, pardonu min! — fleksigis ŝi genuojn antaŭ Krucume, pendanta super la lito. — Pardonu min, Dio! Donu al mi forton batali kun tentoj, helpu al mi venki mian pekan mondan senton!

Pasie fluas la vortoj de l' preĝo, malalte kliniĝis la peka kapo, la varmaj larmoj kovras okulojn kaj gutas sur la preĝeme kunmetitajn manojn... kaj la koro doloras kaj celas al tiu malluma pina arbaro, kie nun rapidaj ĉevaloj forportas de ŝi por eterne du plej karajn personojn. Kaj en la unua fojo ekkomprenis la monaĥino, kian teruran eraron ŝi faris, foririnte monaĥejon sen vera religiema sento, sole tial, ke ŝi ne sciis kien sin meti en la mondo.

Sur la monaĥeja turo oni eksonoris al la preĝo.

Malrapide leviĝis de genuoj la monaĥino, sopire ĉirkaŭrigardis la ĉambreteton kaj subite kun malespero ekrompis siajn manojn. La tutan vivon, longan, longan vivon devas ŝi pasigi en tiu ĉi malgrandeta monaĥa ĉambreto, la tutan vivon, ĝis tia tempo, kiam ĝin anstataŭigos alia, ankoraŭ pli malvasta kaj la monaĥejaĵ sonoriloj eksonoros por ŝi “eternan memoron”...

Kaĉo.

(Fabelo de *M. E. Saltikov*).

(Tradukis *V. Laskin*).

La kuiristino kuiris kaĉon kaj metis sur la tablon. La sinjoroj formangiĝis la kaĉon, diris dankon, kaj la infanoj ĉirkaŭlekis siajn fingrojn. Tre bona estis la kaĉo, ĝi plaĉis al ĉiuj kaj al ĉiuj faris plezuron. “Ha! kiel dolĉa estas la kaĉo! Ha! kiel mola estas la kaĉo! Bonega kaĉo!” tiel ĉiuj paroladis. “Kuiristino! kuiru ĉiun tagon tian kaĉon.” La sinjoroj satiĝis, regalis

ĝis la sato la gastojn kaj elmetis unu tason da kaĉo sur la strato por la preterirantoj. "Manĝu, bonaj homoj, iom da kaĉo! rigardu, kia ĝi estas! ĝi mem ensaltas en la buŝon. Manĝu pli, tio-ĉi plaĉas al ĝi." Kaj ĉiu aliradis, ŝovadis la kuleron en la kaĉon, manĝadis kaj viŝadis la buŝon.

La kaĉo estis tiel dividebla kaj mola, ke ne sentis eĉ la plej malgrandan maloportunecon esti manĝata. Kontraŭe, aŭskultante la laŭdojn de ĉiuj, ĝi eĉ fieriĝis. Ĝi staras sur la tablo kaj bloviĝas senĉese per la aerblovaĵoj. "Sendube, mi estas bona, se la sinjoroj min amas. Kuiristino! kial vi malrapidas? enverŝu ankoraŭ!"

Ĉu longan, ĉu mallongan tempon tio daŭris, sed la kaĉo iom post iom komencis malplaĉi al la sinjoroj. Ili fariĝis multe pli civilizitaj, ol antaŭe; eĉ tiuj sinjoroj, kiuj altiĝis el malnobla stato, komencis preferi gelatenojn kaj blanmanĝeojn.

"Pro Dio!" diris unu: "kia bonaĵo estas en tiu-ĉi kaĉo? Ĉu tio-ĉi estas manĝaĵo? Gustu ĝin, kiel ĝi estas mola! kiel muka kaj dolĉa!"

"Fordonu ni tiun-ĉi kaĉon al porkoj!" daŭrigas alia, "kaj veturu al varmaj akvoĵoj por la promenado! Ni promenu kiom ni volos, kaj poste, se estos necese, revenu domen por manĝi la kaĉon!"

Nu, bone! kial do ne? Al la kaĉo estas tute egale, de kia rango la persono ĝin manĝas, nur manĝu. La porko enŝovis sian buŝegon ĝis la oreloj en la kaĉon kaj komencis sonadi per makzeloj tiel laŭte, ke estis aŭdata en la tuta korto. Ĝi manĝas kaj krias: "mi kuŝiĝos, manĝinte la kaĉon de l' sinjoroj!" La malnobla porko ne scias la saton; se la kuiristino malrapidas, ĝi jam krias: "enverŝu ankoraŭ!" Se oni diras al ĝi: "jam la kaĉo estas formanĝita", ĝi komencas serĉi kaj fosi per la buŝo en ĉiuj anguloj kaj anguletoj kaj sub la sterko.

Manĝadis la porko, manĝadis kaj ĉion formanĝis ĝis la lasta guto. Promenadis la sinjoroj, promenadis kaj ĉion elspezis ĝis la lasta kopeko. Elspezis kaj diras unu al alia: "nu, ni ne havas plu da mono por niaj promenadoj; revenu domen por manĝi la kaĉon!"

La sinjoroj alveturis domen, prenis la kulerojn, rigardas — jen de la kaĉo nur sekaj restaĵoj! Kaj nun ĉiuj, kiel la sinjoroj, tiel ankoraŭ la porkoj, krias per unu voĉo: "ni manĝis la kaĉon kaj ne konservis por la estonteco! Per kio ni kvietigos nian malsaton? Kie vi estas, kaĉo? Revoku!"

Hina spegulo.*)

Muzeo de Perm ricevis de s. A. I. Ber maloftan donacon — hinan aŭ japanan spegulon. Ĝi estas ronda metala spegulo, naŭ koloroj en diametro, arĝentita kaj bone polurita sur spegulanta flanko, kaj sur posta flanko de spegulo estas figuraĵo.

Originaleco de tiu ĉi spegulo konsistas en tio, ke se oni direktas sur ĝin radiojn de suno, sur ekranon aŭ plafonon, aŭ sur kia ajn alia plataĵo precize rebatiĝas figuraĵo, farita sur posta flanko de spegulo. En Hinujo, kiel diras s-ro Ber, estas nur du fabrikoj por preparado de tiaj speguloj, kaj en pasinta

*) Kiel la legantoj vidos, s-ro Lojko ne uzas la artikolon.

tempo por eksporto de speguloj el Ĥinuĵo oni punadis per morto. Tiuj speguloj prezentas ĝis nun problemon por instruituloj, ĉar oni ne povas klarigi, kial radioj de lumo rebatas postan supraĵon. Estis supozo, ke tiuj speguloj estas malrapide presadataj kaj per tio malordigas egala dismeto de metalo; partetoj ricevas alian direkton kaj se tiam posta flanko estas polurita, lumo, falanta sur aliigita kunmetaĵo de spegulo, rebatas mason da partetoj de metalo konforme al figuraĵo. Sed tiu ĉi klarigo ne estas taŭga por ĥina spegulo, unue, ĉar ĝi estas ne presita, sed fandita, kaj due, ĉar spegulanta supraĵo estas arĝentita kaj tial ĉia alidismeto de partetoj de metalo estas kovrita per arĝento.

Forta ĉambra lampo tre malsufiĉe anstataŭas lumon de suno, kaj figuraĵo estas vidata nur tre malklare. Ĉe lumigo per ordinara elektra lampo de 16 kandeloj rebatiĝo estis ankoraŭ pli malforta. Kun pli forta elektra lumo oni ne povis fari sperton, ĉar oni ĝin ne havis. — Spertoj kun tiu ĉi spegulo estis faritaj en redakcio de "Permskija Gubernskija Vjedomosti" kaj donis, ĉe lumo de suno, klaran figuraĵon de posta flanko de spegulo. ("Z. S.")

I. Lojko.



El privata vivo de niaj amikoj.

Antaŭ kelkaj semajnoj unu el niaj amikoj transsendis al ni privatan leteron de s-ro Trompeter, kiel la plej gravan parton ni presas pli malsupra. Kiel niaj legantoj mem vidos, tiu ĉi letero tuŝas la faktojn, kiuj havas menion komunan kun nia lingvo kaj nia afero: — ĝi tuŝas sole la privatan vivon de s-ro Trompeter kaj la maljustecojn, kiujn li devis elsuferi en la lasta tempo. Pensante tamen, ke la nomoj de la personoj, kiuj faras maljustecojn en kia ajn lando, ĉiam meritas esti "glorigitaj" per la preso, kaj ke ĉio, tuŝanta la vivon de s-ro Trompeter, kiu tre multe faris kaj faras por nia lingvo, ne estas tute seninteresa por liaj amikoj, t. e. por la plimulto de la esperantistoj, ni decidis publikigi la leteron, ricevinte por tio la permeson de s-ro Trompeter. Jen kion skribas nia amiko:

"Mia vivado baldaŭ estos iom ŝanĝita, ĉar vole-ne-vole mi devos ripozi. En la lastaj jaroj mi pli kaj pli min retiris de multaj laboroj, okupante min preskaŭ nur je la komisionoj por unu granda minejo karba, nomata "Consolidation" en Schalke. La aliajn komisionojn mi iom post iom rifuzis, ĉar "Consolidation" alportis multajn laborojn, la salajro sufiĉis kaj mi deziris havi pli da tempo por ripozi, por vojaĝi kaj por okupadi min je aliaj aferoj, laŭ mia kutimo. Ĉe la "Consolidation" regas solĉe la generaldirektoro Boniver, naskita en Belgujo. La prezidantaro, elektita de la akcia societo, sekve de la posedantoj mem, interparolas nur kun Boniver, kiu, estante komercisto, ne multon scias pri la minejoj, kiujn li eĉ neniam vidis sub la supraĵo de l' tero. Mi en mia ofico de Markscheider (geometro) ne dependas de Boniver, sed de la registaro (Oberbergamt); nur pri la salajro mi devis trakti kun li. Ĉio iris tre bone, kaj mi ellaboradis sufiĉajn enspezojn: por mi restis ĉirkaŭ 3,000 mk. ĉiujare. Por mia alia ofico de inĝeniero mi recevis de "Consolidation" 3,000 mk. kaj en tio ĉi devis havi konsilojn kun Boniver, ke li konsentu miajn projektojn kaj permesu la elspezojn por konstruaĵoj k. c. Pro kelkaj kaŭzoj, kiujn mi ne tute scias, mi en la lastaj jaroj ne harmoniis kun Boniver: ni

korespondis nur skribe, kio kompreneble elvokadis malkomprenajojn. — Boniver havas 2. nevojn; li donis al ili oficojn ĉe "Consolidation" kaj donadis al ili ĉiam pli kaj pli da rajtoj. Li mem fariĝis riĉa, ekz. en 1895 li ricevis krom sia salajro, loĝejo k. c. 47,000 mk., dume la prezidantaro por 4 konferencoj ricevis 69,000 mk. Nature li deziris sin liberigi de laborado, sed antaŭe li zorgis pri siaj nevoj. Oni devus kondukadi tiujn ĉi infanojn paŝo post paŝo, laborante kun ili, sed estis malfacile prezenti al si, ke oni povos veni sub ilian ordonon. Tamen tio okazis, kaj la unua nevo devis ordoni, kion mi faru. Mi petis skribe la ĉefan direktoron Boniver, ke li liberigu min de mia ofico de inĝeniero, kaj ke mi restu sole Markscheider. En tiu ĉi sama tago mi havis la unuan malgrandan disputon kun la nevo *Hadtstein*. Boniver decidis, ke mi forlasu ĉiujn oficojn. Li min tute ne vidis, ne demandis, ne aŭdis. Li ricevis ankaŭ la konsenton pri tio de la prezidantaro, kiu ankaŭ min ne konas, ne vidis, ne aŭdis. Tiel mi falis por la interesoj de unu familio. — Kiam *Hadtstein* preparis sian edziĝon, lia estonta bopatro fariĝis liveranto de ligno por "Consolidation" kaj nun ricevas por tio po 25,000 mk. ĉiumonate; la frato de *Hadtstein* liveras ĉiumonate por "Consolidation" oleon por 5,000 mk. k. c. Tiamaniere la interesoj de "Consolidation" pli kaj pli suferas antaŭ la interesoj de unu familio, kaj ŝajnas, ke "Consolidation" estas bieno de Boniver. — Nun mi ne fariĝos ree sklavo, ne serĉos novan oficon kaj vivos el la rimedoj, kiujn mi ellaboris kaj ŝparis dum mia malfacila 19-jara laborado ĉe "Consolidation". — Via *W. H. Trompeter*.

De la redakcio.

De nia gazeto ankoraŭ restas ĉiuj numeroj de l' komenco de l' jaro. Tial la redakcio petas la abonantaron provi varbi novajn abonantojn. Nia gazeto, tiel grava ilo de la sukceso de nia kara lingvo, tre bezonas ĉiun subtenon, kaj post duonjaro ĝia enhavo ne povas esti malpli interesa.

Rusaj abonantoj sin turnu al s-ro Gernet, Odessa, kaj aliaj al la klubo esperantista, Upsala, Svedujo. *Red.*

De niaj abonantoj.

— S-ro *M. M. Abesgus* (Odeso, Knjajeskaja 4) skribas al ni:

"Sendube ĉe ĉiu esperantisto iafoje naskiĝas demandoj, kiujn li mem ne povas solvi, ekz. la demandoj pri terminoj geografiaj, historiaj k. t. p.; naskiĝas ankaŭ aliaj demandoj kaj temoj, kiujn li volus proponi al la mondo esperantista. Por ĉiuj similaj demandoj kaj temoj mi permesas al mi proponi al la estimata redakcio aranĝi en nia gazeto apartan "Demandolokon"; ĉiu povas sendi siajn demandojn por la "Demandoloko" kaj ĉiu, kiu volas, respondos tiujn ĉi demandojn. La redakcio mem difinos, kiaj demandoj havas nur personan signifon — la respondoj al tiuj ĉi demandoj estas sendataj senpere al la aŭtoro de la demando — kaj kiuj havas komunan signifon — al tiuj ĉi demandoj la respondoj estos sendataj la redakcion kaj presataj en la gazeto. Cetere mi pensas, ke la estimata redakcio mem difinos la detalojn, se ĝi trovos tiun ĉi proponon atentinda."

“Mi ne dubas, ke tiu apartaĵo iom vivigos la prilaboradon de la lingvo, disvolvante ĉian naskiĝontan demandon, helpante ĉe la ellaborado de teknikaj esprimoj kaj donante al la esperantistoj novan manieron por komenci la reciprokan intersanĝon de pensoj.”

La proponon de s-ro Abesgus ni volonte akceptas kaj ne dubas, ke la nova rubriko, al kiu ni donos la titolon “*Demandoj kaj respondoj*” havos sukceson kaj estos utila por nia lingvo. *Ni petas la legantojn sendi al ni diversajn demandojn, por ke ni povu komenci la novan rubrikon en la sekvanta numero.*

* * *

Adresaro de niaj abonantoj.

Bohemujo.

405. Josef Socha. 9 K-komando Josefo. *Josefstadt.*

Danujo.

406. Jón Jónsson. Lakjargata 2. *Reykjavik, (Island).*

Finnlando.

407. G. J. Ramstedt, fil. mag. (instruisto ep. la finna liceo). *Martinstrato, 5. Abo.*

Francujo.

(El la centoj de s-ro de Beaufront).

52—54. René Lemaire. 7 place Carnot. *Epernay (Marne).*

55. André Lemaire. 7 place Carnot. *Epernay.*

56. L. Verron. Rue de l'Écaille. *Epernay.*

57. B. R. de Maigret. 19 rue du Commerce. *Epernay.*

58. D-ro Delfau. 58 rue du Rocher. *Paris.*

59. E. d'Eyssautier. 128 rue de Grenelle. *Paris.*

60. M. Maymou. Collège de *Jully (Seine-et-Marne).*

61. G. Maillard. 4 rue du Four-Sceaut (Seine).

62. A. de Peyredouille. *Villeneuve, par Blaye (Gironde).*

63. J. Chandon. *Epernay.*

64. J. Paille, caissier au Crédit Lyonnais. *Gray (H-te Saône).*

65. J. Lubac, chez M-r Denis Fabre. 19 rue Durand. *Montpellier.*

66. Capitaine Delevaque, cap. d'Etat Major. 1 cours d'Ormesson. *Châlons s/ Marne.*

67. M-lle Lalouette. 19 rue du Commerce. *Epernay.*

68. André Bur. 18 rue du Commerce. *Epernay.*

69. A. A. Trenay. 68 rue de l'Oust. *Paris.*

70. H. Semper. 11 St. Christophe. *Soissons (Aisne).*

71. Capitaine Moch. 49 rue Galilée. *Paris.*

72. Marcel Laignier. 59 rue Libergier. *Reims.*

73. H. Husson. 125 rue N.-D. des Champs. *Paris.*

74. A. Jubin, à *Dainville par Arras (Pas-de-Calais).*

75. S-rino A. Roux, professeur d'Allemand au Collège de Jeunes Filles à *Louhans (Saône-et-Loire).*

76. L. Peltier, maître répétiteur au Collège de *S-te Ménehould (Marne).*

Germanujo.

408. H. Zeidler. *Kalthof, Westpreussen.*

409. Gefratoj Gesell. *Oranienburgstr. 27. Berlin [0].*

410. H. Sonnenkalb. 9 III Colonnaden. *Hamburg.*

411. Ad. Ehner, cand. med. *Nichelsdorf, per Gänhagen, via Tapiau, Ostpreussen.*

Portugalujo.

412. Aranko Pereira, *Gouveia.*

Rusujo.

413. E. Brandt, p. adr. s-ro Ad. Lessing. *Peterburg.*

414. M. Vitkin. *Kremenčug [A. Pesockij].*

415. M. Zilbernik, *apotekisto, Kremenčug.*

416. A. V. Čumačenko, pr. domo. *Kremenčug.*

417. N. I. Kjun. Bankirskaja Kontora I. Bunimoviča. *Kremenčug.*

418. M. A. Bromberg. Bankirskaja Kontora I. Bunimoviča. *Kremenčug.*

419. B. Klaus. Deribasovskaja kaj Rišeljevskaja, d. de Ralli, n:o 9, loĝ. 21. *Odessa.*

420. Miropolski. *Bazarnaja, 77. Odessa.*

421. M. M. Arnold. Upravlenije glavnaĥo injenera Nov. Kommerč. Portov. Dvorjanskaja, 30. *Odessa.*

422. L. E. Vajnsťejn, p. adr. H. Braul. Kanatnaja 57. *Odessa [A. Arnold].*

423. A. K. Rejner. *Jelatna (gub. de Tambov).*

424. V. Sojecki, *Baku.*

425. A. Zákrevski. Oficerskaja Sloboda, d. de Erdeli. *Smolensk.*

426. **E. Loginov.** *Minusinsk* (gub. Jenisejskaja).
 427. **V. P. Levitski.** *Uman* (gub. de Kiev).
 428. **A. Valdenberg,** d-ro. Grjibovskaja, 5. *Varsovio*.
 429. **A. Avsenev.** *Buturlinovka* (gub. de Voronej).
 430. **J. Raekson.** Riga-Orlovskaja Fervojo, tra la st. *Remershof*, imenie *Remershof*.
 431. **K. A. Ĉajko,** d-ro. Stac. *Pariĉi* (gub. de Minsk).
 432. Redakcio de ĵurnalo "Marki". Bulvarno-Kudrjavskaja, 23. *Kiev*.
 433. **Ĵ. Nudelman.** M. *Priluka*, tra *Turbov* (gub. de Kiev).
 434. **L. Shmuleviĉ.** Rognedinskaja, 5. *Kiev*.
 435. **A. Naumann.** Loĝejo de la komisaro de vilaĝanaĵ aferoj. *Ĵelenovo* (gub. de Sedlec, distr. Garvolinski).
 436. D-ro **Rojnovski.** *Borisoglebsk* (gub. de Tambov).
 437. **Avalov.** Bakinski Meĵevoj Okrug. *Baku*.
 438. **G. Rjabinin.** Ĉerniŝovskaja, 30. *Harkov*.
 439. **N. A. Studenecki.** *Borisoglebsk* (gub. de Tambov).
 440. **A. N. Janicki,** instruisto de fiziko en reala gimnazio. *Novozibkov* (gub. de Ĉernigov).
Svedujo.
 441. **E. Gullbrandsson.** *Söderhamn*.
 442. **Reinh. Thorsén.** Rundviks angsåg. *Nordmaling*.
 443. **Gustaf Arell.** *Söderhamn*.
Svisujo.
 77. M-me **Hutclimson.** 4 B-d du Théâtre. *Genève* [L. de Beaufront].
 78. **Wright.** 4 B-d du Théâtre. *Genève* [L. de Beaufront].
 444. **M. S. Bogdanov,** étudiant en droit. Boulevard du pont d'Arve, 16. *Genève*.
Tunisujo.
 79. **J. M. C. Ganouna.** Poste Française. *Tunis* [L. de Beaufront].
 445—447. Nekonataj poŝtabonantoj.

* * *

Unu el niaj amikoj sciigis nin, ke s-ro *Oskar Serk* en Peterburgo ne estas kontenta, ke ni metis lian adreson ("propravole", li skribas) en la adresaron de niaj abonantoj, ĉar li abonis la gazeton ne por si, sed por la peterburga rondeto volapŭka, pri kies ekzistado la eldonanto de la "Lingvo Internacia", kiel pensas s-ro Serk, ne deziras skribi en la gazeto. Ni esperas, ke tiuj ĉi linioj konvinkos s-ron Serk, ke lia nomo aperis erare en nia nomaro, kaj ke ni havas nenian deziron kaŝi antaŭ niaj legantoj la ekzistadon de la volapŭka rondeto en Peterburgo.

Red.

ANONCOJ.

S-ro J. A. Jivotovski

instruas senpage personojn, deziran-tajn ellerni la lingvon Esperanto.
Odessa, Staroportofrankovskaja 80.

En la venonta monato aŭgusto mi intencas vojaĝi tra Svisujo, vidi tie belajn altaĵojn. Dum la lasta parto de septembro mi intencas esti en Berlin vidi la tiean ekspozicion, nun ankoraŭ ne sciante en kiu semajno. — En la okazo, ke ia esperantisto intencus la saman, mi petas sciigon, ke ni skribe konsideru, ĉu ni povus vojaĝi komune dum pli-malpli longa tempo.

V. H. Trompeter,
Schalke, Westfalen.

En lavejo de Duĥovnij

(Odeso, *Evrejskaja 23*)

oni akceptas tolaĵon de ĉia speco. Laŭ la deziro de mendanto la lavejo sendas servanton por preni kaj resendi tolaĵon.

Eliris el presejo N^o 87 de nia literaturo

FANTOMOJ,

rakonto de *V. Korolenko.*

El lingvo rusa tradukis *V. Gernet.*

La verko kostas 0,90 fr. = 0,35 rub. (kun transendo 1 fr. = 0,40 rub.). La monon oni povas sendi en poŝtsignoj.

Oni povas ricevi la libron de la *Uppsala Esperantoförening*, de s-ro *L. de Beaufront*, de d-ro *Zamenhof* kaj de la tradukinto.

La gazeton **Lingvo Internacia** oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Portugalujo** ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Remeslennaja 11, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.

En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

LINGUIST.

Unabhängige Zeitung für alle Freunde der Weltspracheidee.

Gazette indépendante pour tous les amis d'une langue internationale.

Independent Gazette for all friends of an international language.

Gased nedeslopik plo flens valik vapükadöla.

Sendependa gazeto por ĉiuj amikoj de lingvo internacia.

Redaktion: *Max Wahren*, Friesenst. 39, Hannover (Germania).

Abonnement pro anno in Germania e universal post-union

Mk 4 = 5 fr. = 4 s. = 2½ fl. = 1 doll.

In Russia R. 2. — per Oscar Serck, W. O. 13 Lin Nr. 52, St. Petersburg.

Bankiera Domo HENRIĤ BLOKK

en *S.-Peterburg* vendas

biletojn kun gajnoj de la 1-a, 2-a kaj 3-a (Dvorjana) pruntoj kun iam-post-iamaj pago. — La antaŭdono estas 20,15 kaj 12 rubl. por unu bileto. — La ĉiumonata pago — 10 aŭ 5 rubl. — La reprezentanto por Odeso:

Jakov Lipoviĉ Hersenevit,

la sola reprezentanto por Odeso kaj Suda Rusujo de modaj ĵurnaloj de ĉiuj landoj de l' mondo, abonado kaj ponumera vendado. — Akceptado de asekuroj de l' vivo de la asekura societo "Zabotlivost". — Kafo "Hektor". — Reprezentanto de la firmo de Jozevski en Kiev por la vendado de mueliloj de fratoj Zek en Drezden. — Apartenaĵoj por mueliloj, svisaj kribriiloj k. c. — Akceptado de la reprezentadoj. Oni bezonas agentojn. — *Odeso, Poŝtovaja, 21.* — Telegramoj: *Odessa — Hersenevit.*

Ĉiu paginta por kvar ekzempleroj de la "**Lingvo internacia**" ricevas la kvinan

senpage.